- La instruist___ instru___ profesin___. (O professor instrui profissionalmente.)
- Ne gustum___ la manĝaĵ___ tre rapid___. (Não saboreie a comida muito rápido.)
- Mi kaj mi___ amik___ komunik___ leter___. (Eu e meus amigos nos comunicamos por carta.)
- La ĝardenist___ vol___ kalkul___ kiom da arb___ estas en la palac___ ĝarden___. (O jardineiro quer contar quantas árvores há no jardim do palácio.)
- Mi pov___ literum___ esperant___ vort___ tre rapid___. (Eu posso soletrar palavras do esperanto muito rápido. Dica: transforme “esperanto” em adjetivo.)

V) Reecreva as frases utilizando o sufixo aumentativo -eg. Siga os modelos:

Ĝi estas granda frukto. – Ĝi estas fruktego. (É um grande fruto [frutão]).
Vi estas tre kuraĝa. – Vi estas kuraĝega. (Você é muito corajoso.)
Vi multe manĝas. – Vi manĝegas. (Você come muito.)

- a) Vi estas tre saĝa. -
- b) Via ĉemizo estas tre ruĝa. -
- c) La monstro havas grandan buŝon. -
- d) Mi tre ŝatas studi Esperanton. -
- e) La komputilo estas en la granda skatolo. -
- f) La generalo havas grandan domon. -
- g) Mi estas tre forta. -
- f) La panjo multe petis rozojn al la paĉjo. -
- g) La lernantoj multe dankis al la instruisto. -

VI) Escreva frases utilizando os verbos abaixo e os nomes das partes do corpo conforme o modelo:

preni – pegar *manĝi – comer* *paŝi – caminhar*
flari – cheirar *vidi – ver* *aŭdi – ouvir*
turni – virar *fleksi – flexionar*

(manoj – preni) Ni uzas niajn manojn por preni. (Usamos nossas mãos para pegar.)

- a) (buŝo – manĝi)
- b) (kruroj – paŝi)
- c) (nazo – flari)
- d) (okuloj – vidi)
- e) (oreloj – aŭdi)
- f) (kolo – turni la kapon)
- g) (kapo – pensi)
- h) (piedoj – paŝi)
- i) (kubutoj – fleksi la brakojn)
- j) (genuoj – fleksi la krurojn)

VII) Respondu:

urbo – cidade *literumi – soletrar* *vorto – palavra*

1. Nu, de kie venas Mazi?
2. El kiu lando vi venas?
3. El kiu urbo vi venas?
4. De kie venas via paĉjo kaj via panjo?
5. Kie estas via libro?
6. Kiun parton de via korpo vi uzas por manĝi?
7. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por preni?
8. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por vidi?
9. Kiun parton de via korpo vi uzas por flari?
10. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por paŝi ?
11. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por aŭdi?
12. Kiun parton de via korpo vi uzas por turni vian kapon?
13. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por fleksi viajn brakojn?
14. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por fleksi viajn krurojn?
15. Diru al mi la partojn de la korpo, kiujn vi scias en Esperanto.
16. Diru al mi nomon de bonega filmo.
17. Ĉu vi estas bonega lernanto?
18. Ĉu vi manĝas rapide?
19. En la rakonto de Mazi, kiu intervjuas biciklistojn?

VIII) Demandu:

1. Mi venis de San Paŭlo.
2. Mia kraĵono estas ĉi tie.
3. Mi uzas mian nazon por flari.
4. Mi uzas miajn krurojn por paŝi.
5. Mi uzas miajn orelojn.
6. Mi uzas mian buŝon.
7. Mi uzas miajn okulojn.
8. Mi uzas miajn manojn.
9. Jes, mi pensas ke ĝi estas bonega.
10. Jes, mi kuras rapide.
11. k-o-s-m-o. (Pergunte: Soletre a palavra "kosmo".)

Respostas da lição 5

b) Bildoj

(Partes do corpo - respostas na figura do diálogo)

- | | | | |
|-------------|----------------|-------------|----------------|
| 1. Britio | 2. Francio | 3. Germanio | 4. Italio |
| 5. Japanio | 6. Grekio | 7. Haltu! | 8. Venu! |
| 9. Rigardu! | 10. Aŭskultu! | 11. Foriru! | 12. intervjuas |
| 13. rapide | 14. biciklisto | | |
| 15. kosmo | | | |

I)

- | | | |
|-------------------------------|------------------------------|---------------------------------|
| a) Ŝi kisis lin amike. | b) Ni forkuris kuraĝe. | c) Mi uzas komputilon profesie. |
| d) Vi fermis la pordon forte. | e) La monstro manĝas terure. | f) Vi rakontas historion bele. |

II)

- | | |
|--|--|
| a) Kie estas la ĉemizo? – Ĝi estas ĉi tie. | b) Kie estas la sandviĉo? – Ĝi estas tie. |
| c) Kie estas la salato? – Ĝi estas ĉi tie. | d) Kie estas la vinberoj? – Ili estas tie. |
| e) Kie estas la glaciaĵo? – Ĝi estas ĉi tie. | f) Kie estas la parkhorloĝo? – Ĝi estas tie. |

III)

- | | | | | | | | | | | |
|------------|------------|--------|--------|--------|--------|-------|--------|------------|--------|--------|
| a) Kio/Kiu | b) Kie | c) kiu | d) kie | e) Kiu | f) Kio | g) Ĉu | h) Kia | i) Kiom da | j) Kie | k) Kia |
| l) Kia | m) kiom da | n) Kia | o) Kie | p) kiu | | | | | | |

IV)

- a) Mazi kaj Karlo estas nun en la malliberejo. (Mazi e Karlo estão agora na prisão.)
- b) La letero estas ĝuste por mi. (A carta é justamente para mim.)
- c) Mi forte amas miajn amikojn. (Eu fortemente amo meus amigos.)
- d) La lernantoj bone komprenis ilian lecionon. (Os alunos compreenderam bem sua lição.)
- e) La bona lernanto saĝe respondis al la instruisto. (O bom aluno sabiamente respondeu ao professor.)
- f) La kvar soldatoj forkondukis la monstرون al la malliberejo. (Os quatro soldados levaram o monstro para a prisão.)
- g) Li malrapide rigardas la belajn okulojn de la princino. (Ele lentamente olha os belos olhos da princesa.)
- h) La instruisto demandis, ĉu mi bone scias mian lecionon. (O professor perguntou se eu sei bem minha lição.)
- i) Aŭlultu atente miajn du demandojn! (Escute atentamente minhas duas perguntas!)
- j) Mi bonvole intervjuis la gardistojn de la palaco. (Eu com boa vontade entrevistei os guardas do palácio.)
- k) La instruisto instruas profesie. (O professor instrui profissionalmente.)
- l) Ne gustumu la manĝaĵojn tre rapide. (Não saboreie a comida muito rápido.)
- m) Mi kaj miaj amikoj komunikas letere. (Eu e meus amigos nos comunicamos por carta.)
- n) La ĝardenisto volas kalkuli kiom da arboj estas en la palaca ĝardeno. (O jardineiro quer contar quantas árvores há no jardim do palácio.)
- o) Mi povas literumi esperantajn vortojn tre rapide. (Eu posso soletrar palavras do esperanto muito rápido.)

V)

- | | | |
|---------------------------------|---|--|
| a) Vi estas saĝega. | b) Via ĉemizo estas ruĝega. | c) La monstro havas buŝegon. |
| d) Mi ŝategas studi Esperanton. | e) La komputilo estas en la skatolego. | f) La generalo havas domegon. |
| g) Mi estas fortega. | f) La panjo petegis rozojn al la paĉjo. | g) La lernantoj dankegis al la instruisto. |

VI)

- | | |
|--|---|
| a) Ni uzas buŝon por manĝi. | b) Ni uzas niajn krurojn por paŝi. |
| c) Ni uzas nian nazon por flari. | d) Ni uzas niajn okulojn por vidi. |
| e) Ni uzas niajn orelojn por aŭdi. | f) Ni uzas nian kolon por turni la kapon. |
| g) Ni uzas nian kapon por pensi. | h) Ni uzas niajn piedojn por paŝi. |
| i) Ni uzas niajn kubutojn por fleksi la brakojn. | j) Ni uzas niajn genuojn por fleksi la krurojn. |

VII) Respondu:

- | | |
|---|--|
| 1. Mazi venas de la kosmo. | 2. Mi venas el Brazilo/Germanio... |
| 3. Mi venas el... | 4. Ili venas el... |
| 5. Ĝi estas sur la tablo./ Ĝi estas en mia sako. | 6. Mi uzas mian buŝon por manĝi. |
| 7. Mi uzas miajn manojn por preni. | 8. Mi uzas miajn okulojn por vidi. |
| 9. Mi uzas mian nazon por flari. | 10. Mi uzas miajn krurojn kaj piedojn por paŝi. |
| 11. Mi uzas miajn orelojn por aŭdi. | 12. Mi uzas mian kolon por turni mian kapon. |
| 13. Mi uzas miajn kubutojn por fleksi miajn brakojn. | 14. Mi uzas miajn genuojn por fleksi miajn krurojn. |
| 15. (Respostas na figura das partes do corpo). | 16. (Resposta pessoal) |
| 17. Jes, mi estas bonega lernanto. / Ne, mi ne estas bonega lernanto. | 18. Jes, mi manĝas rapide./ Ne, mi ne manĝas rapide. |
| 19. Petro intervjuas la biciklistojn. | |

VIII) Demandu:

- | | |
|--|--|
| 1. El kiu urbo vi venis? | 2. Kie estas via kraĵono? |
| 3. Kiun parton de via korpo vi uzas por flari? | 4. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por paŝi? |
| 5. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por aŭdi? | 6. Kiun partojn de via korpo vi uzas por manĝi? |
| 7. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por vidi? | 8. Kiujn partojn de via korpo vi uzas por preni? |
| 9. Ĉu vi pensas, ke (nome de algum filme, banda, etc.) estas bonega? | |
| 10. Ĉu vi kuras rapide? | |
| 11. Literumu la vorton "kosmo". | |

LEITURA COMPLEMENTAR

5 – Vetro - tempo

Estas vintro nun en Novjorko. Pluvas... Hieraŭ neĝis kaj hodiaŭ pluvas.

É inverno agora em Nova Iorque. Chove... Ontem neveu e hoje chove.

Bona vetero por legi libron...

Bom tempo para ler um livro...



Esperable la suno brilos morgaŭ, ĉar tiam mi biciklos kun amiko.

Esperadamente o sol brillará amanhã, porque assim andarei de bicicleta com um amigo.

Fakte al mi pli plaĉas somero ol vintro.

De fato a mim mais me agrada o verão do que o inverno.

Dum somero ofte estas varma vetero ĉi tie. Mi tre ŝatas kiam la suno brilas!

Durante o verão freqüentemente o tempo é quente aqui. Adoro quando o sol brilha.

Kiam estas ĉirkaŭ 25 gradoj celsiaj (77 farenhejtaj) estas perfekte, laŭ mi.

Quando está cerca de 25 graus Celsius (77 farenheits) está perfeito, na minha opinião.

Por mi estas tro varme kiam estas sune kaj super 30 gradoj celsiaj (86 farenhejtaj).

Para mim é quente demais quando está ensolarado e acima de 30 graus Celsius (88 farenheits)

Post somero estas agrable kiam aŭtuno venas kun freŝa aero kaj iom da pluvo.

Depois do verão é agradável quando o outono vem com ar fresco e um pouco de chuva.


Kaj post vintro estas agrable kiam printempo venas kun pli varma vetero.

E depois do inverno é agradável quando a primavera vem com tempo mais quente.

Kontrastoj bonas... Suno venu!

Os constrates são bons... Que venha o sol!

vintro – inverno	nun – agora	pluvi – chover
hieraŭ – ontem	neĝi – nevar	hodiaŭ – hoje
vetero – tempo (condições atmosféricas)		esperable – com esperança
la suno brilas – o sol brillará	morgaŭ – amanhã	ĉar tiam – porque então
somero – verão	dum – durante	varma – quente
kiam – quando	ĉirkaŭ – cerca de, aproximadamente	
grado – grau	Celsio – Celsius	Farenhejto – Farenheit
laŭ – de acordo com	tro – demais	post – depois de
aŭtuno – outono	freŝa – fresco	aero – ar
iom da – um pouco de	printempo – primavera	kontrasto – constraste
ebl - sufixo - possibilidade, possibilidade se se fazer. esperable (esperadamente)		



REVISÃO 2

Traduza para o Português:

1. Arestu lin. Forkonduku ilin. - 2. Ĉu numero dek naŭ? Ĝuste, jes. - 3. Numero dek tri. Dek ok. Dek du. Dudek. - 4. Ĉu la fruktoj estas bongustaj? - 5. Ĉu vi havas mian skatolon? - 6. Malfermu ĝin, mi petas. - 7. Mi estas malsata. - 8. Ni estas malsataj. - 9. La frukto estis bongusta. - 10. Jen bongustaj kaj malbongustaj persikoj. - 11. Jen bongustaj pruno kaj vinbero. Gustumu ilin. - 12. Ne manĝu ilin, mi petas. - 13. Ĉesu! - 14. Ĉu ili ŝatas bongustajn prunojn? - 15. Aŭskultu! - 16. La grandajn sonorilojn aŭskultis ŝi. - 17. Mi ne manĝis tion. - 18. Tion mi ne ŝatis, sed mi ŝatas tion ĉi. - 19. Kiu vi estas? - 20. Kio estas via nomo? - 21. Kio estas via aĝo? - 22. Ĉu ĉi tio estas por mi? - 23. Ne, tio ĉi ne estas por vi, sed tio estas por ni. - 24. Ĝi estas nia. - 25. De kie vi estas? - Mi venis de tie. Nun mi estas ĉi tie. - 26. Ankaŭ ŝi estas de tie. - 27. Tio. - 28. Ĉi tio. - 9. Ĉu ili estas el Germanio? - Ne, ili estas el Japanio. - 30. Venu! Foriru! Haltu! Iru for! Revenu!

Corrija:

1. Prendam-no! Levem-no embora./Levem-no daqui. 2. Número dezenove? Sim, justamente. 3. Número treze. Dezoito. Doze. Vinte. 4. As frutas são gostosas? 5. Você tem minha caixa? 6. Abra-a, por favor. 7. Eu estou com fome. 8. Nós estamos com fome. 9. A fruta era gostosa. 10. Eis pêssegos gostosos e ruins. 11. Eis uma ameixa e uma uva gostosas. Experimente-as. 12. Não as experimente, por favor. 13. Pare! 14. Eles gostam de ameixas gostosas? 15. Escute! 16. Ela ouviu os grandes sinos. 17. Eu não comi isso. 18. Eu não gosto daquilo, mas eu gosto disto. 19. Quem é você? 20. Qual é seu nome? 21. Qual é sua idade? 22. Isto é para mim? 23. Não, isto não é para você, mas aquilo é para nós. 24. É nosso. 25. De onde você é? Eu venho de lá. Agora estou aqui. 26. Ela também é de lá. 27. Aquilo. 28. Isto. 29. Eles são da Alemanha? Não, eles são do Japão. 30. Venha! Vá embora! Pare! Vá embora. Volte.

Traduza para o Esperanto:

1. Número dezessete. Onze. Vinte. - 2. Estou com fome. - 3. Eles estão cheios (satisfeitos)? - 4. Mazi comeu o relógio? - 5. Eu não gosto de relógios grandes. - 6. Nossos relógios são gostosos. - 7. Não coma seu relógio (o relógio deles), por favor. - 8. O que é isso? - 9. Isto é gostoso. Experimente-o. - 10. Por favor, não o coma. - 11. Isto é bom, mas aquilo é ruim. - 12. Eu gosto daquilo, mas não gosto disto. - 13. Isto é para mim? - 14. Para quem é isto? - 15. O que você come? - 16. Pare! - 17. De onde ele é? - 18. Ele é da Itália, mas agora ele está aqui. - 19. Vamos! Pare! Venha. Vá embora! - 20. Quem é você. Qual é seu nome? - 21. O teu sanduiche é bom? - 22. Você gosta da minha motocicleta? - 23. Volte!

Corrija:

1. Numero dek sep. Dek unu. Dudek. 2. Mi estas malsata. 3. Ĉu ili estas sataj? 4. Ĉu Mazi manĝis la horloĝon? 5. Mi ne ŝatas grandajn horloĝojn. 6. Niaj horloĝoj estas bongustaj. 7. Ne manĝu ilian horloĝon, mi petas. 8. Kio estas tio? 9. Ĝi estas bongusta. Gustumu ĝin! 10. Bonvolu ne manĝi ĝin. 11. Ĉi tio estas bona, sed tio estas malbona. 12. Mi ŝatas tion, sed mi ne ŝatas ĉi tion. 13. Ĉu ĉi tio estas por mi? 14. Por kiu estas ĉi tio? 15. Kion vi manĝas? 16. Ĉesu! 17. De kie estas li? 18. Li estas de (ou "el") Italio, sed nun li estas ĉi tie. 19. Ni iru. Haltu! Venu. Foriru. (ou "Iru for.") 20. Kiu estas vi? Kio estas via nomo? 21. Ĉu via sandviĉo estas malbongusta? 22. Ĉu vi ŝatas mian motorciklon? 23. Revenu!

RAKONTO

Parto 3 - Sceno 3

Karlo: Ni estas amikoj.

Karlo: Nós somos amigos.

Ambaŭ: Kune vi kaj mi. Amikoj estas ni. Mi kaj vi, pli kaj pli, amikoj estas ni! (ripeto). Du amikoj ni!

Ambos: Juntos você e eu. Amigos somos nós. Eu e você, mais e mais, amigos somos nós! (repetição) Dois amigos nós!

Karlo: Rigardu!

Karlo: Olhe!

Mazi: Kion?

Mazi: O quê?

Karlo: Jen, tion, supre!

Karlo: Eis, isso, acima!

Mazi: Kion?

Mazi: O quê?

Karlo: Jen, bongustaj stangoj!

Karlo: Eis, barras gostosas!

Mazi: Ho, ne. Dankon, ne!

Mazi: Oh, não. Obrigado, não!

Karlo: Jes! Manĝu la stangojn! Unu, du, tri, kvar, kvin! Ni estas liberaj! Vi estas libera kaj ankaŭ mi! Ni estas liberaj!

Karlo: Sim! Coma as barras! Um, dois, três, quatro, cinco! Estamos livres! Você está livre e também eu! Nós estamos livres!

Mazi: Libera vi, libera mi, liberaj estas ni!

Mazi: Livre você, livre eu, livre estamos nós!



Karlo: Liberaj ni, vi kaj mi. Liberaj estas ni!

Karlo: Livres nós, você e eu. Livres estamos nós!

Mazi: Liberaj...

Mazi: Livres...

Karlo: Estas ni! Ek!

Karlo: Estamos nós! Vamos!

Ili saltas el la malliberejo.

Eles saltam da prisão.

Ambaŭ: Mi kaj vi...

Ambos: Eu e você...

Mazi: Mi estas libera! Mi sentas... malvarmon, malsaton, sed mi estas libera!

Mazi: Eu estou livre! Eu sinto... frio, fome, mas eu estou livre!

Sceno 4

Petro: Malvarma! Varma! Malsata! Soifa! Malseka! Seka!

Petro: Frio! Quente! Faminto! Sedento! Molhado! Seco!

Sceno 5

Petro: Mi soifas!

Petro: Estou com sede!

Virino: Trinku akvon!

Mulher: Beba água!

Petro: Tre varma!

Petro: Muito quente!

Virino: Pardonu!

Mulher: Perdão!

Petro: Mi malsatas.

Petro: Eu tenho fome.



Virino: Manĝu sandviĉon!
Mulher: Coma um sanduíche.

Petro: Mi ŝvitas!
Petro: Eu estou suando.

Virino: Duŝu vin!
Mulher: Duche-se!

Petro: Mi malsekas!
Petro: Eu estou molhado!

Virino: Viŝu vin!
Mulher: Seque-se!

Petro: Mi sentas malvarmon.
Petro: Eu sinto frio.

Virino: Surmetu puloveron.
Mulher: Meta um pulôver.

Petro: Mi estas laca!
Petro: Eu estou cansado!

Virino: Ripozu!
Mulher: Repouse!

Sceno 6

Mazi: Brrr! Mi malvarmas! Karlo! Karlo? Kie vi estas? Karlo!
Mazi: Brrr! Estou com frio! Karlo! Karlo? Onde você está? Karlo!

Karlo: Mazi!
Karlo: Mazi!

Mazi: Karlo! Kie vi estas?
Mazi: Karlo! Onde você está?

Karlo: Ĉi tie!
Karlo: Aqui!



Mazi: Kie? Mi ne vidas vin!
Mazi: Onde? Eu não vejo você!

Karlo: Mi estas ĉi tie, sur la arbo.
Karlo: Eu estou aqui, sobre a árvore.

Mazi: Sur kiu arbo?
Mazi: Sobre qual árvore?

Karlo: Sur la arbo... sub kiu vi staras. Aj! (li falas)
Karlo: Sobre a árvore... sob a qual você está de pé. Ai! (ele cai)

Mazi: Mi estas... sub...
Mazi: Eu estou... sob...

Sceno 7

Voĉo: Kie vi estas?
Voz: Onde você está?

Petro: Sub la kesto.
Petro: Sob a caixa.

Voĉo: Kie vi estas?
Voz: Onde você está?


Petro: Sur la kesto.
Petro: Sobre a caixa.

Voĉo: Kie vi estas?
Voz: Onde você está?

Petro: En la kesto.
Petro: Dentro da caixa.

Voĉo: Kie vi estas?
Voz: Onde você está?

Petro: Antaŭ la kesto.
Petro: Na frente da caixa.



Voĉo: Kie vi estas?

Voz: Onde você está?

Petro: Malantaŭ la kesto.

Petro: Atrás da caixa.

Voĉo: Kie vi estas?

Voz: Onde você está?

Petro: Inter la kestoj.

Petro: Dentro da caixa.

Voĉo: Kie estas la kesto?

Voz: Onde está a caixa?

Petro: Tie!

Petro: Lá!

Voĉo: Kie la kesto estas nun?

Voz: Onde está a caixa agora?

Petro: Ĉi tie!

Petro: Aqui!

Karlo kaj Mazi apud la rivero.

Karlo e Mazi perto do rio.

Karlo: Kiel vi fartas? Kiel vi fartas?

Karlo: Como você está? Como você está?

Mazi: Tre bone! Kvankam mi estas malseka kaj malsata! Kie estas la palaco?

Mazi: Muito bem! Embora eu esteja molhado e faminto! Onde está o palácio?

Karlo: Jen, tie!

Karlo: Eis, lá!

Mazi: Kie?

Mazi: Onde?

Karlo: Rigardu, ĝi estas tie! Ho, la palaco! (suspiro) Silvja estas tie.

Karlo: Olhe, está lá! Oh, o palácio! (suspiro) Silvja está lá.



VORTARO

ambaŭ:	ambos
kun:	com
kune:	junto
ni:	nós
pli:	mais
pli kaj pli:	mais e mais, cada vez mais
supre:	acima
stango:	barra
libera:	livre
ili:	eles
malvarma:	frio
varma:	quente
sata:	saciado, satisfeito
malsata:	faminto, com fome
sed:	mas, porém
soifi:	ter sede
soifa:	sedento
soifo:	sede
trinki:	tomar, beber
akvo:	água
ŝviti:	suar, transpirar
duŝi:	lavar, tomar banho de ducha
seka:	seco
malseka:	molhado
viŝi:	secar
surmeti:	(sur/met/i) colocar, meter
pulovero:	blusa de lã, pulôver
laca:	cansado
ripozi:	repousar, descansar
sur:	sobre
sub:	sob
stari:	estar de pé
fali:	cair
apud:	perto de
rivero:	rio
Kiel vi fartas?:	Como você vai?
kiel:	como
farti:	estar, ir (de saúde)
tre:	muito
kvankam:	apesar de, embora
tiel:	assim, deste modo

Vocabulário adicional:

suno: sol **luno:** lua **nubo:** nuvem **stelo:** estrela **kafo:** café **sukero:** açúcar **lakto:** leite

a) Traduku:

Ambaŭ (Karlo kaj Mazi): Kune vi kaj mi... Amikoj estas ni. Mi kaj vi, pli kaj pli, amikoj estas ni!

ambos =

com =

junto =

nós =

mais =

Karlo: Rigardu!

Mazi: Kion?

Karlo: Jen, tion, supre!

Mazi: Kion?

Karlo: Jen, bongustaj stangoj!

Mazi: Ho, ne. Dankon, ne!

Karlo: Jes! Manĝu la stangojn! Unu, du, tri, kvar, kvin! Ni estas liberaj!

acima =

barra =

livre =

Ili saltas el la malliberejo.

eles =

Mi estas libera! Mi sentas... malvarmon, malsaton, sed mi estas libera!

frio =

saciado =

com fome =

mas, porém =

Petro: Mi soifas!

Virino: Trinku akvon!

Petro: Tre varma!

Virino: Pardonu!

ter sede =

sedento =

sede =

beber =

água =

quente =

Petro: Mi ŝvitas!

Virino: Duŝu vin!

suar =

lavar =

Petro: Mi malsekas!

Virino: Viŝu vin!

seco =

molhado =

secar =

Petro: Mi sentas malvarmon.

Virino: Surmetu puloveron.

colocar =

blusa de lã, pulôver =

Petro: Mi estas laca!

Virino: Ripozu!

cansado =

repousar =

Karlo: Mi estas ĉi tie, sur la arbo.

Mazi: Sur kiu arbo?

Karlo: Sur la arbo... sub kiu vi staras? Aj! (li falas)

sobre =

sob =

estar de pé =

cair =

Karlo kaj Mazi estas apud la rivero.

perto de =

rio =

Karlo: Kiel vi fartas?

Mazi: Tre bone! Kvankam mi estas malseka kaj malsata!

kiel vi fartas? =

como =

estar, ir (de saúde) =

tre =

apesar de, embora =

Portu ĝin tiel.

Vi manĝis tiel rapide!

assim, deste modo =

b) Bildoj:



1. Karlo kaj Mazi nun estas am _____. Ili estas k_____ en la mall_____.



2. Karlo diras al Mazi por manĝi la _____.



3. Nun, Mazi kaj Karlo estas _____ kaj ili saltas k_____ el la malliberejo.



4.



5.



6.



7.



8.



9.



10.

Li _____ sin.



11.

Ŝi _____ sin.



12.

Li _____ ĉemizon.



13.

Li _____.



14.

Ŝi _____ akvon.



15.

Li estas _____.



16.

Li r_____.



17.

Ili ne sidas, ili s_____.



18.



19.



20.

- **KIU** (quem, qual, que)

Até agora usamos kiu no sentido de “quem, que pessoa?”, mas também pode significar “qual?”

Mi estas en la arbo! — En kiu arbo? — En la arbo, sub kiu vi staras!

Eu estou na árvore! — Em qual árvore? — Na árvore sob a qual você está de pé!

- **KIO, KIU ou KIA?**

kio – o que, que coisa

kiu – que, quem, qual

kia – como, que espécie de, que tipo de

Como vimos na tabela de correlativos da lição introdutória, a partícula ki- é utilizada para se formar palavras interrogativas e relativas. A terminação –u indica indivíduo, coisa definida; ao passo que a terminação –o indica coisa indefinida.

Os correlativos terminados em –o (como *kio* e *tio*) são verdadeiros substantivos (da mesma forma como *libro*, *domo*):

Kio estas tio? - Tio estas mapo. (O que é isso? – Isso é um mapa.)

Da mesma forma como não se pode colocar dois substantivos lado a lado (exemplo: *domo patro* – casa pai), não se pode tampouco colocar os correlativos terminados em –o junto de substantivos. Assim a pergunta “*Kion libron vi legas?*” está incorreta.

Com substantivos podemos usar correlativos terminados em –a (como *kia*), e os terminados em –u (como *kiu*).

Kian libron vi legas? — Mi legas interesan (novan, Esperantan) libron.

Que tipo de livro você lê? — Eu leio um livro interessante (novo, de Esperanto).

Kiun libron vi legas? — Mi legas biblion.

Que livro você lê? — Eu leio a bíblia.

Como mostram as respostas, *kiu libro* e *kiu libro* não são iguais: quando usamos *kia*, queremos saber a qualidade (devemos responder usando um adjetivo); perguntando por *kiu*, queremos saber o nome do livro.

Kiun malsanon li havas? - Li havas gravan malsanon.

Como é [descreva, com um adjetivo] a doença que ele tem? — Ele tem uma doença grave.

Kiun malsanon li havas? - Li havas ftizon.

Qual doença ele tem? – Ele tem tísica [tuberculose].

<http://pt.lernu.net/lernado/gramatiko/seppik/lec13.php#91>

De uma forma geral, nas perguntas, podemos entender *kio* como “o que”, e *kiu* como “qual/quem”. Então qual das duas formas é correta? “**Kiu estas via nomo?**” ou “**Kio estas via nomo?**” (Qual é o seu nome?). Apesar da discussão sobre qual forma é melhor, Bertilo Wennergren, membro da Academia de Esperanto, afirma que as duas formas estão corretas. De fato existem diversas maneiras de ver a essência dessa pergunta. Para alguns é natural ver a pergunta como uma seleção entre todos os nomes do mundo, por isso usam *kiu* (Qual, de todos os nomes, é o seu nome?). Porém alguns sentem que é natural ver o nome como uma coisa, um substantivo, e aí cabe perguntar “**Kio estas via nomo?**”. Pode-se perguntar ainda *Kiel vi nomiĝas?* (Como você se chama?). * O mesmo é válido para outras questões como: “*Kio/Kiu estas via adreso?*” (Qual é seu endereço?), “*Kio/Kiu estas via profesio?*” (Qual é sua profissão?), “*Kio/Kiu estas via ŝatokupo?*” (Qual é seu lazer favorito?), etc. As formas como perguntas desse tipo são vistas podem variar de uma língua para outra. No português, por exemplo, para perguntas assim usamos a idéia de “*kiu*” (Qual é o seu nome?); já no inglês, usamos a idéia de “*kio*” (What is your name?). Por isso em Esperanto, as duas formas de pensar estão corretas. E da mesma forma que no português, podemos até mesmo usar a idéia de “*kia*” (*Kia estas via nomo?* – Como é seu nome?).

Flexão:

KIA e KIU devem ser flexionados no plural e no acusativo quando necessário (*kiaj*, *kian*, *kiajn*, *kiuj*, *kiun*, *kiujn*). KIO não é usado no plural, mas aceita acusativo (*kion*).

Kiu li estas? - Quem é ele?

Kiuj ili estas? — Quem são eles?

Kiun vi amas? — Quem você ama?

Kiu vin amas? — Quem ama você?

Kion vi volas? — O que você quer?

Kiajn ĉemizojn vi volas? — Que tipos de camisetas você quer?

- **KIEL** (como, de que forma, de que maneira)

Kiel é um correlativo formado por ki-(partícula interrogativa) mais -el (modo, maneira). A idéia de se perguntar por um modo se traduz por “como, de que maneira”. Quando perguntamos usando “*kiel*”, esperamos que a pessoa responda usando advérbios.

* http://cs.lernu.net/lernado/gramatiko/demandoj/kio_kiu_estas_via_nomo.php

Kiel vi fartas? – Mi fartas bone. (Como você vai? – Eu vou bem.)

Kiel rapide li kuris? – Li kuris tre rapide. (O quão rápido ele correu? – Ele correu muito rápido.)

• **TIEL** (desse jeito, dessa maneira, tão, assim)

Tiel é um correlativo formado por ti- (partícula eu indica) mais –el (modo, maneira). A idéia de se indicar um modo se traduz por “desse jeito, assim, etc.” Tiel logicamente responde a kiel:

Kiel? – Tiel. (Como? – Assim./ De que jeito? – Desse jeito.)

Portu ĝin tiel. (Carregue isto assim.)

Vi manĝas tiel rapide! (Você come tão rápido!)

PRAKTIKADO PER LEGADO

Dialogo inter du amikoj

- Saluton, Anĝelika! Kiel vi fartas?
- Saluton, Henriko! Mi fartas tre bone, kaj vi?
- Mi fartas pli bone nun.
- Pli bone nun? Kion vi volas diri? Ĉu vi fartis malbone?
- Ho, jes. Mi havis teruran doloron en la stomako, sed mi iris al la kuracisto kaj nun mi fartas pli kaj pli bone.
- Ĉu la kuracisto donis al vi medikamenton?
- Jes. Unue li donis al mi medikamenton kaj do mi ripozis.
- Ĉu vi scias la kaŭzon de via stomakdoloro?
- Jes, mi bone scias. Tiu estis la problemo: hieraŭ mi iris al tiu nova restoracio kun mia familio kaj kelkaj amikoj. Mi gustumis multajn sandviĉojn, salatojn, sukojn, glaciaĵojn... mi manĝegis kaj trinkegis. Sed tiuj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ne estis tre bonaj por mia stomako.
- Terure! Vi ne devas manĝi tiel multe. Via stomako certe ne dankis vin.
- Vi pravas. Sed mi estis tiel masata kaj tiel soifa, ke mi ne povis ĉesi meti pli kaj pli da manĝaĵoj en mia buŝon. Mi ankaŭ ne povis ĉesi demandi al la kelnero, ke li alportu min pli. Kvankam mi manĝis, mi estis pli malsata.
- Nun vi vidas la rezulton, ĝi ne estis bona.
- Jes, tre malbona rezulto. Ĉu vi memoras mian amikinson el Kanado?
- Ne, mi ne bone memoras ŝin. Kia ŝi estas? Kiel ŝi nomiĝas?
- Ŝi nomiĝas Amanda. Ŝi havas nigrajn okulojn, kaj belajn longajn harojn. Ŝi estas tiel bela kiel princino, kaj ŝi...
- Jes, jes, jes... nun mi bone memoras ŝin. Kio pri ŝi?

- Ni iris al la restoracio kune, kaj ŝi ankaŭ ne fartas bone nun. Ni ambaŭ havas stomakdoloron! Sed mi ne komprenas... ŝi ne manĝis tiel multe kiel mi.
- Mi ne kredas! Mi pensas ke la manĝaĵo de tiu restoracio estis infektita je bakterioj.
- Vi pravas. Mi ne pensis pri tio.
- Nu, parolu pri alia afero. Mi kaj miaj amikoj iros morgaŭ naĝi en la rivero apud la domo de Jakobo. Ĉu vi volas iri kune?
- Ne... Mia stomako doloras min, mi estas tre laca, kaj estas tre malvarme por naĝi.
- Malvarme? Surmetu puloveron, do! Sed certe estas tre varme! Mi ŝvitas!
- Do, duŝu vin.
- Ho, mi volas ke vi iru kun ni al la rivero! Bonvolu! Pensu pri tio.
- Ne, dankon. Mi vere ne volas naĝi tie. Oni diras ke la akvo en tiu rivero estas tre malpura... tre infektita.
- Ho, tio ne estas vera. Mi pensas, ke la akvo de la rivero ne estas tiel infektita kiel la manĝaĵon kiun vi maĝis hieraŭ.

EKZERCOJ

I) Você está explicando a um amigo como ele pode fazer certas coisas. Use “tiel” para responder. Siga o modelo:

Kiel mi povas uzi la komputilon? – Vi povas uzi la komputilon tiel.

(Como posso usar o computador? – Você pode usar o computador assim.)

- Kiel mi povas uzi vian motorciklon?
- Kiel mi povas fari vian sandviĉon?
- Kiel mi povas fari vian sukun?
- Kiel mi povas skribi vian nomon?
- Kiel mi povas gimnastiki?

II) Complete com:

kio – o que	kiu – quem, qual
kia – como, que tipo	kie – onde
kiom da – que quantidade de, quantos	kiel – como, de que maneira
tio – isso, aquilo	tie – aí, lá
tiel – assim, dessa forma	ĉu – partícula interrogativa

- a) _____ estas via ĉemizo? – Ĝi estas ruĝa.
 b) _____ li manĝas lian manĝaĵon? – Li ĝin manĝas rapide.
 c) Ĉu via motorciklo estas _____? – Ne, ĝi estas tie ĉi.
 d) _____ vi manĝas? – Mi manĝas glaciaĵon. (Dica: preste atencio no acusativo!)
 e) _____ arbustoj estas antaŭ via domo? – Mi pensas ke estas dek kvin.
 f) _____ via patrino rakontas historion? – Ŝi bele rakontas.
 g) Kio estas _____? Ĝi estas mia sonorilo.
 h) _____ estas via kato? – Li estas sur la ŝultro de mia patro.
 i) _____ estas via kato? – Li estas bela kaj malgranda.
 j) _____ fartas ili? – Bone.
 k) _____ vi volas trinki akvon? – Ne, mi ne estas soifa.
 l) _____ estas Mazi? – Li estas apud la rivero.
 m) _____ vi fartas? – Mi fartas tre bone, dankon!
 n) Rigardu! Vi devas skribi _____.
 o) _____ estas via patrino? – Ŝi estas Sofio.
 p) Ne parolu _____ rapide!
 q) _____ frukton vi manĝas? – Mi manĝas prunon. (Acusativo!)
 r) _____ manĝaĵon vi ŝatas? – Mi ŝatas bongustan manĝaĵon.
 s) _____ estas via profesio? – Mi estas oficiro.
 t) Ĉu vi scias, _____ komputiloj estas en la universitato? – Ne, ni devas kalkuli!
 u) _____ vi scias vian lecionon? – Mi bone scias!
 v) _____ estas mia pulovero? – Ĝi estas _____, malantaŭ la kesto.
 w) _____ vi kaj viaj amikoj ŝatas studi? – Ni ŝatas studi kune.

III) Agora vamos praticar o plural e o acusativo de alguns correlativos. Complete cada uma das 10 frases a seguir com uma das 10 palavras do quadro. Cada palavra corresponde a uma frase, portanto cada uma é usada apenas uma vez.

	kio	kion		
kiu	kiun	kiuj	kiujn	
kia	kian	kiaj	kiajn	

- a) _____ librojn vi ŝatas legi? – Mi ŝatas legi esperantajn librojn.
 b) _____ estas en via domo nun? – Mia patro estas tie.
 c) Ili estas la virinoj, _____ vi amas.
 d) Ĝi estas la frukton, _____ mi ŝatas.
 e) _____ la knabino volas manĝi? – Ŝi volas salaton.
 f) _____ frukton vi volas gustumi? – Mi volas malgrandan frukton.
 g) _____ estas la viroj antaŭ la fruktobudo?
 h) _____ estas malantaŭ via domo? – Estas arbusto.
 i) _____ estas via buŝo? – Ĝi estas granda kaj ruĝa.
 j) _____ estas ŝiaj okuloj? – Ili estas belaj.

IV) Escreva frases usando “kvankam”. Siga o modelo.

(trinkis akvon – soifas) *Kvankam mi trinkis akvon, mi soifas. (Embora eu tomei água, tenho sede).*

- a) (ripozis – estas laca)
 b) (viŝis min – malsekas)
 c) (duŝis min – ŝvitas)
 d) (surmetis puloveron – estas malvarma)
 e) (manĝis – malsatas)

V) Escreva perguntas e respostas utilizando os advérbios de lugar que vimos nesta lição. Siga o modelo:



(glaso – tablo)
 Kie estas la glaso?
 Ĝi estas sur la tablo.

a) (glaso – tablo)



b) (kraĵono – libro)



c) (knabo – rivero)




d) (kato – domo)



e) (knabo – arbo)




f) (viro – domo)



g) (viro – domoj)



h) (virino – viro)



i) (suno – nuboj)



j) (luno – suno)



VI) Respondu:

1. Ĉu vi havas multajn amikojn?
2. Ĉu vi ŝatas kafon kun sukero aŭ sen sukero?
3. Ĉu vi ŝatas kafon kun aŭ sen lakto.
4. Ĉu vi kaj viaj amikoj ŝatas studi kune?
5. Kion Karlo diris al Mazi, ke li manĝu en la malliberejo?
6. Kiom da stangoj manĝis Mazi?
7. Ĉu Mazi kaj Karlo estas liberaj?



8. Kiu estas ili?

9. Mazi manĝis la stangojn. Kiel ili forkuris el la malliberejo?

10. Ĉu vi sentas varmon aŭ malvarmon?

11. Ĉu vi estas seka aŭ malseka?

12. Kion vi volas fari, kiam vi estas malsata?

13. Kion vi volas fari, kiam vi estas soifa?

14. Ĉu vi volas trinki akvon nun?

15. Ĉu vi ŝvitas?

16. Kion vi devas fari, kiam vi multe ŝvitas?

17. Ĉu vi havas puloverojn? Kiom?

18. Ĉu vi estas laca?

19. Kion vi devas fari, kiam vi estas tre laca?

20. Ĉu Mazi varmas aŭ malvarmas?

21. Mazi ne vidis Karlon. Kie estis Karlo?

22. Sur kiu arbo estis Karlo?

23. Ĉu vi sidas aŭ staras?

24. En la filmo, Mazi estis sub la arbo. Kio okazis al Karlo?



25. Kio okazas al li?

26. Kio estas Nilo, en Afriko?
27. Mazi kaj Karlo saltis el la malliberejo. Kien falis Mazi?
28. Ĉu Karlo falis ankaŭ en la riveron? Kien falis Karlo?
29. Kio estas antaŭ via domo?
30. Kio estas malantaŭ via domo?
31. Ĉu via amiko fartas bone?
32. Kiel vi fartas?
33. Kvankam mi manĝis, mi estas malsata. Nun kompletigu: Kvankam mi trinkis akvon....
34. Kompletigu: Kvankam mi ripozis...
35. Kompletigu: Kvankam mi surmetis puloveron...
36. Diru al mi nomon de muziko, kiun vi tre ŝatas.
37. Diru al mi frukton, kiun vi tre ŝatas.

VII) Demandu:

1. Mi fartas tre bone, dankon.
2. Mia paĉjo kaj mia panjo fartas bone, dankon.
3. Jes, mi havas multajn amikojn.
4. Mi ŝatas mian kafon kun sukero kaj lakto.
5. Jes, mi kaj miaj amikoj ŝatas studi kune.
6. Ne, mi ne ŝvitas.
7. Mi havas kvin puloverojn.

8. Jes, mi estas laca.
9. Mi sidas.
10. Ĝi estas sub la libro.
11. Malantaŭ mia domo estas alia domo.
12. Ĝi estas en la libro.
13. Ĝi falis.
14. Nilo estas rivero en Afriko.

Respostas da lição 6

b) Bildoj

(Posições - respostas na figura do diálogo.)

- | | | |
|---|--------------|-------------------|
| 1. Karlo kaj Mazi nun estas amikoj. Ili estas kune en la malliberejo. | 2. stangojn. | 3. liberaj - kune |
| 4. malvarma | 5. varma | 6. malsata |
| 7. soifa | 8. malseka | 9. seka |
| 10. Viŝu vin! | 11. duŝas | 12. surmetas |
| 13. ŝvitas | 14. trinkas | 15. laca |
| 16. ripozas | 17. staras | 18. rivero |
| 19. pulovero | 20. kesto | |

I)

- | | |
|--|---------------------------------------|
| a) Vi povas uzi mian motorciklon tiel. | b) Vi povas fari mian sandviĉon tiel. |
| c) Vi povas fari mian sukron tiel. | d) Vi povas skribi mian nomon tiel. |
| e) Vi povas gimnastiki tiel. | |

II)

- | | | | | | | | | | | |
|--------------|---------|---------|---------|------------|---------|---------|------------|------------|---------|-------|
| a) Kia | b) Kiel | c) tie | d) Kion | e) Kiom da | f) Kiel | g) tio | h) Kie | i) Kia | j) Kiel | k) Ĉu |
| l) Kie | m) Kiel | n) tiel | o) Kiu | p) tiel | q) Kiun | r) Kiun | s) Kio/Kiu | t) Kiom da | u) Kiel | |
| v) Kie - tie | | w) Kiel | | | | | | | | |

III)

- | | | | | | | | | | |
|----------|--------|----------|---------|---------|---------|----------|--------|--------|---------|
| a) Kiajn | b) Kiu | c) kiujn | d) kiun | e) Kion | f) Kian | g) Kiujn | h) Kio | i) Kia | j) Kiaj |
|----------|--------|----------|---------|---------|---------|----------|--------|--------|---------|

IV)

- | | |
|---------------------------------------|--|
| a) Kvankam mi ripozis, mi estas laca. | b) Kvankam mi viŝis min, mi malsekas. |
| c) Kvankam mi duŝis min, mi ŝvitas. | d) Kvankam mi surmetis puloveron, mi estas malvarma. |
| e) Kvankam mi manĝis, mi malsatas. | |

V)

- | | |
|---|--|
| a) Kie estas la glaso? - Ĝi estas sub la tablo. | b) Kie estas la kraĵono? - Ĝi estas en la libro. |
| c) Kie estas la knabo? - Li estas apud la rivero. | d) Kie estas la kato? - Ĝi estas antaŭ la domo. |
| e) Kie estas la knabo? - Li estas sur la arbo. | f) Kie estas la viro? - Li estas malantaŭ la domo. |
| g) Kie estas la viro? - Li estas inter la domoj. | h) Kie estas la virino? - Ŝi estas apud la viro. |
| i) Kie estas la suno? - Ĝi estas malantaŭ la nuboj. | j) Kie estas la luno? - Ĝi estas antaŭ la suno. |

VI) Respondu

1. Jes, mi havas multajn amikojn. / Ne, mi ne havas multajn amikojn.
2. Mi ŝatas kafon kun/sen sukero.
3. Mi ŝatas kafon kun/sen lakto.
4. Jes, ni ŝatas studi kune. / Ne, ni ne ŝatas studi kune.
5. Li diris al Mazi, ke li manĝu stangojn..
6. Li manĝis kvin stangojn.
7. Jes, li estas liberaj.
8. Ili estas reĝo kaj reĝino.
9. Ili saltas el la malliberejo.
10. Mi sentas malvarmon/varmon.
11. Mi estas seka/malseka.
12. Kiam mi estas malsata, mi volas manĝi.
13. Kiam mi estas soifa, mi volas trinki akvon.
14. Ne, mi ne volas trinki akvon. / Jes, mi volas trinki akvon.
15. Ne, mi ne ŝvitas. / Jes, mi ŝvitas.
16. Kiam mi multe ŝvitas, mi devas duŝi min.
17. Jes, mi havas (numero) puloverojn. / Ne, mi ne havas puloverojn.
18. Jes, mi estas laca. / Ne, mi ne estas laca.
19. Kiam mi estas tre laca, mi devas ripozi.
20. Mazi malvarmas.
21. Li estis sur la arbo.
22. Li estis sur la arbo sub kiu Mazi staris.
23. Mi sidas. / Mi staras.
24. Karlo falis el la arbo.
25. Li falis.
26. Nilo estas granda rivero.
27. Mazi falis en la riveron.
28. Ne, Karlo ne falis en la riveron. Li falis en la arbon.
29. Antaŭ mia domo estas... (alia domo, budo – “tenda”).
30. Malantaŭ mia domo estas... (arboj, alia domo).
31. Jes, mia amiko fartas bone./ Ne, mia amiko ne fartas bone.
32. Mi fartas bone. / Mi fartas malbone./Mi ne fartas bone.
33. Kvankam mi trinkis akvon, mi estas soifa.
34. Kvankam mi ripozis, mi estas laca.
35. Kvankam mi surmetis puloveron, mi estas malvarma.
36. (Resposta pessoal)
37. (Resposta pessoal)

VII) Demandu

1. Kiel vi fartas?
2. Kiel fartas via paĉjo kaj via panjo?
3. Ĉu vi havas multajn amikojn?
4. Kiel vi ŝatas vian kafon?
5. Ĉu vi kaj viaj amikoj ŝatas ludi kune?
6. Ĉu vi ŝvitas?
7. Kiom da puloveroj vi havas?
8. Ĉu vi estas laca?
9. Ĉu vi sidas aŭ staras?
10. Kie estas... (la plumo)?
11. Kio estas malantaŭ via domo?
12. Kie estas... (mia skrapgumo)?
13. Kio okazis al... (mia kraĵono)?
14. Kio estas Nilo?

LEITURA COMPLEMENTAR

6 – Studoj – Estudos

Mi nun estas en la lasta jaro antaŭ ol mi povos studi ĉe universitato.
Estou agora no último ano antes de eu poder estudar na universidade.

Estas iom malfacile scii kion mi ŝatus studi tie...
É um pouco difícil saber o que eu gostaria de estudar lá...

Eĉ malpli facile scii kio mi ŝatus fariĝi!
É ainda menos fácil saber o que eu gostaria de me tornar.

Ĉu programisto, ĉu instruisto, ĉu ĵurnalisto, ĉu flegisto?
Programista, professora, jornalista, enfermeira?



Eble mi ŝatus fariĝi kuracisto, se mi sukcesos eniri tiun universitaton.
Talvez eu gostaria de me tornar médica, se eu conseguir entrar nessa universidade.

Momente miaj notoj ne estas sufiĉe bonaj, sed mi provas studi tre diligente nun.
No momento minhas notas não estão suficientemente boas, mas eu posso estudar muito diligentemente agora.

Mi ankaŭ pripensas fari paŭzon en la studoj dum iom da tempo.
Eu também penso em fazer uma pausa nos estudos durante algum tempo.

Estus tre interese povi vojaĝi en fremdaj landoj kaj renkonti novajn kulturojn!
Seria muito interessante poder viajar em países estrangeiros e conhecer novas culturas!

Sed tio kostus multe da mono kaj mi ne scias kiel akiri tiun monon...
Mas isso custaria muito dinheiro e eu não sei como adquirir esse dinheiro...

Ankaŭ studi en universitato kostas multe da mono ĉi tie, sed miaj gepatroj pretas pagi por tio.
Também estudar na universidade custa muito dinheiro aqui, mas meus pais estão prontos a pagar por isso.

Trovi iun laboron estas tre malfacile, do mi plej verŝajne studos ion venontjare... Sed kion?
Encontrar algum trabalho é muito difícil, então eu mais provavelmente estudarei algo no ano que vem... Mas o quê?

"Aspektigisto" (palavra que aparece na ilustração) é uma pessoa que dá aspecto a algo. Frequentemente é usado para uma pessoa que dá aspecto a uma página da Internet ou alguma outra coisa (por exemplo uma roupa).

lasta – último	jaro – ano
antaŭ ol – antes de	povos – futuro do verbo “poder”
ĉe – em	iom – um pouco
malfacile – difícil	scii – saber
mi ŝatus – eu gostaria	eĉ – até, até mais, ainda
fariĝi – tonar-se	flegisto – enfermeiro
eble – talvez, possivelmente	kuracisto – médico
sukcesi – ter sucesso, conseguir	eniri – entrar
sufiĉe – suficientemente	provi – tentar
diligente – diligentemente	pripensi – refletir, pensar
fari – fazer	paŭzo – pausa
dum – durante	povi – poder
vojaĝi – viajar	fremda – estrangeiro
renkonti – encontrar, conhecer	kosti – custar
mono – dinheiro	akiri – adquirir
preta – pronto	preti – estar pronto
trovi – achar	laboro – trabalho
verŝajne – provavelmente	venontjare – ano que vem
-os- Terminação que indica futuro. Mi studos (Eu estudarei).	
- us - Terminação para verbos na forma condicional. Mi ŝatus studi (Eu gostaria de estudar).	
- ist - Sufixo - profissão, ocupação. Programisto (programador)	

LECIONO 7

3.9 - 4.1

DIALOGO

Parto 3 - Sceno 9

En la komputilejo.

Na sala de computador

Korvaks: Mi estas Korvaks! Aŭskultu! Ĉu vi aŭdas min?

Korvaks: Eu sou Korvaks! Escute! Você me ouve?

Pseŭdo-Silvja: (kapjesas) Mmmm.

Pseŭdo-Silvja: (afirma com a cabeça) Mmmm.

Korvaks: Nun! Ĉu vi vidas min?

Korvaks: Agora! Você me vê?

Pseŭdo-Silvja: (kapjesas) Mmmm.

Pseŭdo-Silvja: (afirma com a cabeça) Mmmm.

Korvaks: Ĉu vi parolas?

Korvaks: Você fala?

Pseŭdo-Silvja: Esperante!

Pseŭdo-Silvja: Em esperanto.

Korvaks: Nun, provu iri!

Korvaks: Agora, tente andar!

Pseŭdo-Silvja: Mi ne povas.

Pseŭdo-Silvja: Eu não posso.

Korvaks: Mi provas denove! Nun. Ĉu vi povas paŝi?

Korvaks: Eu tento de novo! Agora. Você pode andar?

Pseŭdo-Silvja: Jes, mi povas.

Pseŭdo-Silvja: Sim, eu posso.



Korvaks: Ĉu vi povas kuri?

Korvaks: Você pode correr?

Pseŭdo-Silvja: Ne, mi ne povas.

Pseudo-Silvja: Não, eu não posso.

Korvaks: Mi provas denove. Silvja, ĉu vi... amas min?

Korvaks: Eu tento de novo. Silvja, você... me ama?

Pseŭdo-Silvja: Ne. Mi ne amas vin. Mi malamas vin!

Pseudo-Silvja: Não. Eu não amo você. Eu odeio você!

Korvaks: Ho, Silvja!

Korvaks: Oh, Silvja!

Pseŭdo-Silvja: Ho, nun mi povas kuri! Ĝis revido!

Pseudo-Silvja: Oh, agora eu posso correr! Até a vista!



Korvaks: Silvja! Haltu! Revenu! (Li batas la komputilon.) Kio okazas?

Korvaks: Silvja! Pare! Volte! (Ele bate no computador.) O que está acontecendo?

(La komputilo produktas 6 Silvja-kopiojn.)

(O computador produz 6 cópias de Silvja.)

Sceno 10

Kanto de la Pseŭdo-Silvjaj...

Kanto das Pseudo-Silvjas...

Pseŭdo-Silvja 1: Paŝas mi.

Pseudo-Silvja 1: Anda eu.

Pseŭdo-Silvja 2: Parolas mi.


Pseudo-Silvja 2: Falo eu.

Pseŭdo-Silvja 3: Aŭdas mi.

Pseudo-Silvja 3: Escuto eu.

Pseŭdo-Silvja 4: Vidas mi.

Pseudo-Silvja 4: Vejo eu.



Pseŭdo-Silvja 5: Mi estas vi.

Pseudo-Silvja 5: Eu sou você.

Pseŭdo-Silvja 6: Vi estas mi.

Pseudo-Silvja 6: Você sou eu.

Pseŭdo-Silvja 2: Ĉu vi estas mi?

Pseudo-Silvja 2: Você sou eu?

Pseŭdo-Silvja 1: Saltas mi.

Pseudo-Silvja 1: Salto eu.

Pseŭdo-Silvja 2: Naĝas mi.

Pseudo-Silvja 2: Nado eu.

Pseŭdo-Silvja 3: Kuras mi.

Pseudo-Silvja 3: Corro eu.

Pseŭdo-Silvja 4: Dancas mi.

Pseudo-Silvja 4: Danço eu.

Pseŭdo-Silvja 5: Mi estas vi.

Pseudo-Silvja 5: Eu sou você.

Pseŭdo-Silvja 6: Vi estas mi.

Pseudo-Silvja 6: Você sou eu.

Ĉiuj: Kiu estas ni?

Todas: Quem somos nós?

Petro: Kiu estas vi?

Petro: Quem é você?

Pseŭdo-Silvjaj 1-6: Mi estas Silvja! Mi estas Silvja! ...

Pseudo-Silvja 1-6: Eu sou a Silvja! Eu sou a Silvja!...

Petro: Ĉiu estas Silvja?

Petro: Cada uma é a Silvja?

Ĉiuj: Jes, ĉiu!

Todas: Sim, cada!



Petro: Ĉu ĉiu?

Petro: Cada?

Ĉiuj: Jes!

Todas: Sim!

Viro: Kiuj estas ili?

Homem: Quem são elas?

Petro: Silvjaj!

PEtro: Silvjas!

Korvaks: Ses Silvjaj! Ahhh!

Korvaks: Seis Silvjas! Ahhh!

Sceno 11

Kanto "Belaj roboj"

Canto "Belos vestidos"

Pseŭdo-Silvja 1: Via robo verda.

Pseudo-Silvja 1: Teu vestido verde.

Pseŭdo-Silvja 2: Via robo ruĝa.

Pseudo-Silvja 2: Teu vestido vermelho.

Pseŭdo-Silvja 3: Ŝia robo blua.

Pseudo-Silvja 3: Seu vestido azul.

Pseŭdo-Silvja 4: La brunan havas mi!

Pseudo-Silvja 4: O marrom tenho eu!

Pseŭdo-Silvja 5: Vere moda, bela, rava estas mia robo flava!



Pseudo-Silvja 5: Verdaderamente da moda, belo, encantador é meu vestido amarelo!

Pseŭdo-Silvja 6: Tute plaĉa estas ankaŭ mia robo nigra-blanka.

Pseudo-Silvja 6: Totalmente agradável é também meu vestido negro-branco.

Pseŭdo-Silvja 1: La brunan ŝatas mi!

Pseudo-Silvja 1: Do marrom gosto eu!



Petro: Ĝis revido!

Petro: Até a vista!

Parto 4 - Sceno 1



En la palaca ĝardeno.

No palácio do jardim.

Silvja: (Ŝi kantas) Kapo, ŝultroj, kruroj du, piedoj du!

Silvja: (Ela canta) Cabeça, ombros, pernas duas, pés dois!

Vidu, aŭdu, spiru plu, pli kaj plu!

Veja, escute, respire mais, mais e mais!

Por muskoloj, por artikoj, bona estas gimnastiko...

Para os músculos, para as articulações, boa é a ginástica...

Mazi: Kie ni estas?

Mazi: Onde nós estamos?

Karlo: Ni estas en la ĝardeno.

Karlo: Nós estamos no jardim.

Mazi: Kie? En via ĝardeno?

Mazi: Onde? No seu jardim?

Karlo: Ne! En la Reĝa ĝardeno. Ha! Tie estas Silvja!

Karlo: Não! No jardim do Rei. Ah! Alí está a Silvja!

Mazi: Kion ŝi faras?

Mazi: O que ela está fazendo?

Karlo: Ŝi gimnastikas!


Karlo: Ela está fazendo ginástica!

Silvja: ...bona estas gimnastiko... Ŝŝŝ! Kaŝu vin malantaŭ tio!

Silvja: ... boa é a ginástica... Chiii! Escontam-se atrás daquilo!

Karlo: Malantaŭ kio?

Karlo: Atrás do quê?



Silvja: Malantaŭ la statuo. Ĉu vi fartas bone?

Silvja: Atrás da estátua. Você está bem?

Karlo: Ne, malbone! Ni estas malsataj. Ĉu vi havas ion por manĝi?

Karlo: Não, mal! Nós estamos com fome. Vocêtem algo para comer?

Mazi: Ĉu vi havas horloĝon por mi?

Mazi: Você tem relógio para mim?

Silvja: Horloĝon?

Silvja: Relógio?

Mazi: Pardonu!

Mazi: Perdão!

Karlo: Jes, horloĝon! Li ŝatas horloĝojn!

Karlo: Sim, relógio! Ele gosta de relógios!

Silvja: Ŝŝŝ! Iu venas!

Silvja: Chiii! Alguém está vindo!

Mazi: Kiu paŝas?

Mazi: Quem está caminhando?



Karlo: Mi ne scias. Mi vidas nenion. Ŝŝŝ! Bone! Ho, ne! Pluvas.

Karlo: Eu não sei. Eu não vejo nada. Chiii! Bem! Oh, não! Está chovendo!

Silvja: Rigardu. Atendu min tie!

Silvja: Olhe. Esperem-me aqui!

Karlo: Bone!

Karlo: Bom!

Silvja: Atendu! Mi venos.

Silvja: Esperem! Eu voltarei.



Karlo: Kiam?

Karlo: Quando?

Silvja: Vespere, je la sepa horo vespere.

Silvja: À noite, às sete horas da noite.

Karlo: Je la sepa. Bone.

Karlo: Às sete. Bom.

Mazi: Kioma horo estas nun?

Mazi: Que horas são agora?



VORTARO

aŭdi	ouvir
kapjesi	(kap-cabeça/jes-sim/i-verbo) afirmar com a cabeça
pseŭdo	pseudo
paroli	falar
esperante	em esperanto
provi	provar, tentar
povi	poder
paŝi	caminhar, dar passos
kuri	correr
bati	bater
Kio okazas?	O que está acontecendo?
okazi	ocorrer, acontecer
produkti	produzir
kopio	cópia
naĝi	nadar
danci	dançar
ĉiu	cada, todo
ĉiuj	todos, todas
robo	vestido, robe
vere	verdadeiramente, na verdade
moda	chique, da moda
rava	encantador
tute	totalmente
plaĉa	agradável
kanti	cantar
spiri	respirar
plu	mais
muskolo	músculo

artiko	articulação
gimnastiko	ginástica
kaŝi	esconder
statuo	estátua
io	algo, alguma coisa
iu	alguém
nenio	nada
pluvi	chover
atendi	esperar
kiam	quando
je la sepa horo	às sete horas
Kioma horo estas?	Que horas são?

KOLOROJ	CORES
nigra	negro
blanka	branco
griza	cinza
ruĝa	vermelho
oranĝa	laranja
flava	amarelo
verda	verde
blua	azul
bruna	marrom

Vocabulário adicional

afero	coisa
diri	dizer
vorto	palavra
plori	chorar
buso	ônibus
ĵeti	jogar, atirar
pilko	bola
haro	cabelo

a) Traduku:

Korvaks: Mi estas Korvaks! Aŭskultu! Ĉu vi aŭdas min?
Pseŭdo-Silvja: (kapjesas) Mmmm.
ouvir =
afirmar com a cabeça =
pseudo =

Korvaks: Ĉu vi parolas?
Pseŭdo-Silvja: Esperante!
falar =
em esperanto =

Korvaks: Nun, provu iri!
Pseŭdo-Silvja: Mi ne povas.
provar, tentar =
poder =
ir apanhar água em um lugar muito distante e trazer para casa um grande cântaro cheio.

En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki.

Um dia, quando ela estava junto daquela fonte, veio a ela uma pobre mulher, que lhe pediu que lhe desse de beber.

“Tre volonte, mia bona”, diris la bela knabino.

“Com muito prazer, minha boa (amiga)”, disse a bela menina.

Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto

E logo lavou seu cântaro e apanhou água no lugar mais limpo da fonte



kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune.

e a trouxe à mulher, sempre amparando o cântaro, para que a mulher pudesse beber mais comodamente.

Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino:

Quanto a boa mulher tranquilizou sua sede, el disse à menina:

“Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon”

“Tu és tão bela, tão boa e tão honesta, que devo fazer-te um presente.”

(ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino).

(porque era uma fada, que tomara a forma de uma pobre mulher de aldeia, para ver quão grande seria a gentileza desta jovem menina).

“Mi faras al vi donacon,” daŭrigis la feino, “ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.”

“Faço-te a dádiva,” continuou a fada, “que a cada palavra que disseres, de tua boca sairá uma flor ou uma pedra preciosa”.



Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto.

Quando esta bela menina retornou para casa, sua mãe a insultou, porque voltara tão tarde da fonte.



“Pardonu al mi, patrino,” diris la malfeliĉa knabino, “ke mi restis tiel longe”.
“Perdoe-me, mãe,” disse a triste menina, “que eu tenha demorado tanto tempo”.

Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj.

E quanto ela disse estas palavras, saltaram de sua boca três rosas, três pérolas e três diamantes.



“Kion mi vidas!” diris ŝia patrino kun grandega miro.
“O que estou vendo!” disse a mãe com enorme pasmo.

“Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj! De kio tio ĉi venas, mia filino?”
“Parece-me que de sua boca saltam pérolas e diamantes! De que vem isto, minha filha?”

(Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino).

(Esta era a primeira vez que ela lhe chamou de sua filha).

La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi,

A triste criança contou a ela ingenuamente tudo o que lhe acontecera,

kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj.

e, enquanto ela falava, saía de sua boca uma multidão de diamantes.

“Se estas tiel,” diris la patrino, “mi devas tien sendi mian filinon.

“Se é assim,” disse a mãe, “eu devo lá mandar minha filha.

Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas;

Mariazinha, olha o que sai da boca de tua irmã quando ela fala;

ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon?

não te seria agradável ter a mesma capacidade?

Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile.”

Só debes ir à fonte apanhar água; e quando uma mulher pobre pedir-te de beber, dar-lho-ás gentilmente.”

“Estus tre bele,” respondis la filino malĝentile, “ke mi iru al la fonto!”

“Seria muito bonito,” respondeu a filha grosseiramente, “que eu fosse à fonte!”

— **“Mi volas ke vi tien iru,” diris la patrino, “kaj iru tuj!” La filino iris, sed ĉiam murmurante.**

— “Quero que vás lá,” disse a mãe, “e vai já!” A filha foi, mas sempre murmurando.

Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo.

Tomou o mais belo vaso de prata que havia na morada.

Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan,

Apenas chegou à fonte, ela viu uma senhora, muito ricamente vestida,

kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki

que saiu da mata e lhe pediu de beber



(tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino).

(era a mesma fada, que tomara a forma e as vestes de uma princesa, para ver quão grande seria a maldade desta menina.)

“Ĉu mi venis tien ĉi,” diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, “por doni al vi trinki?”

“Eu vim aqui,” disse-lhe a grosseira e orgulhosa menina, “para lhe dar de beber?”

Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino!

Certamente, eu trouxe um vaso de prata especialmente para isso, para dar de beber a esta senhora!

Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki.”

Minha opinião é: pegue você mesmo água, se quiser beber.”



— **“Vi tute ne estas ĝentila,” diris la feino sen kolero.**

— “Você absolutamente não é gentil,” disse a fada sem cólera.



“Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano.”

“Bem, como você é tão serviçal far-lhe-ei um presente, que a cada palavra que você disser sairá de sua boca uma serpente ou uma rã.”

Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: “Nu, mia filino?”

Logo que sua mãe a notou, gritou-lhe: “Então, minha filha?”

— **“Jes, patrino”, respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon.**

— “Sim, mãe”, respondeu-lhe a grosseirona, lançando uma serpente e uma rã.

— “Ho, ĉielo!” ekkriis la patrino, “kion mi vidas? Ŝia fratino en ĉio estas kulpa;
— “Oh, céus!” exclamou a mãe, “o que eu vejo? A irmã dela é culpada de tudo;

mi pagos al ŝi por tio ĉi!” Kaj ŝi tuj kuris bati ŝin.
ela me pagará por isto!” E ela logo correu para batê-la.



La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro.

A triste criança fugiu e escondeu-se na floresta mais próxima.



La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis;
O filho do rei, que voltava de caça, encontrou-a;

kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi
tute sola kaj pro kio ŝi ploras.
e, vendo que ela era tão bela, perguntou-lhe o que estava fazendo alí inteiramente sozinha
e por que ela chora.

— “Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo”.
— “Ai de mim, senhor, minha mãe tocou-me de casa”.

La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj,
O príncipe, que viu que de sua boca saíram algumas pérolas e alguns diamantes,

petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas.
pediu-lhe que lhe dissesse de onde vinha isto.

Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli
grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino,
Ela contou-lhe toda sua aventura. O príncipe considerou que tal capacidade tem mérito
muito maior do que tudo o que se pudesse dar como dote a outra moça



forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi.
conduziu-a ao palácio de seu pai, o rei, onde se casou com ela.

Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia
propra patrino ŝin forpelis de si;
Mas a respeito da irmã dela, podemos dizer que se tornou tão odiável, que sua própria mãe
a expulsou de casa;

kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ
mortis en angulo de arbaro.

e a infeliz menina, muito correndo e não encontrando ninguém, que quisesse aceitá-la, logo
morreu num canto de uma floresta.

feino: fada
fiera: orgulhoso
boneco: bondade
devigi: obrigar
ĉerpi: apanhar (líquido)
subteni: amparar
donaco: presente, doação
juna: jovem
ŝtono: pedra
perlo: pérola
ŝajni: parecer
sendi: enviar, mandar
kapablo: capacidade
loĝejo: morada, casa
rano: rã
ĵeti: atirar, lançar
plori: chorar
reĝido: príncipe
doto: dote
-ind- (sufixo): digno de. aminda: amável, adorinda: adorável

vidvino: viúva
portreto: retrato
honesteco: honestidade
kuirejo: cozinha
kruĉo: cântaro
oportuna: cômodo, oportuna, propício
vilaĝo: aldeia
multekosta: caro
malfrue: tarde
miro: admiração, pasmo
naiva: ingênuo
sama: mesmo
arĝento: prata
servema: serviçal
rimarki: notar
ĉaso: caça
forpeli: expulsar
indo: mérito, dignidade
fraŭlino: moça, senhorita

ĜENERALA REVIZIO
Revisão Geral

Parabéns! Você chegou até aqui! Muita informação, não é? Pois este é o momento de reforçar todas essas informações adquiridas com uma boa revisão. Isso permitirá que você avelie seu aprendizado e perceba aonde você conseguiu chegar até agora.

Como revisão, procure ouvir e ler novamente todos os textos do livro e assista atentamente ao filme do começo ao fim. Depois faça os exercícios que seguem.

O primeiro exercício consiste em um **vocabulário temático ilustrado** que inclui quase todos os substantivos concretos que aprendemos neste curso. Sua tarefa será escrever em esperanto o nome de cada um desses substantivos abaixo de cada figura. Confira suas respostas ao final do exercício.


O segundo exercício é uma **revisão geral de vocabulário**. São definições de praticamente todas as palavras que estudamos retiradas de dicionários, ou frases que devem ser completadas. Sua tarefa é fornecer a palavra correta conforme a definição ou o contexto da frase, sempre prestando atenção na questão do plural ou singular, acusativo, tempos verbais, etc. Além de serem trabalhadas quase todas as centenas de palavras que aprendemos no curso, outros vocábulos são apresentados. Porém tratam-se na maioria das vezes de palavras semelhantes ao português, e quando a compreensão se torna muito difícil, há a tradução em colchetes.

Este último exercício em particular é de valiosa importância, pois não se trata apenas de uma revisão, mas de um material que irá prepará-lo para utilizar o Esperanto com maior desenvoltura em situações mais complexas, como a leitura de artigos e livros, a elaboração de textos na língua e mesmo a conversação.

Mãos à obra!

ILUSTRITA TEMA VORTARO – Vocabulário Temático Ilustrado

BESTOJ KAJ PLANTOJ (animais e plantas)



MANĜAĴOJ KAJ TRINKAĴOJ (comidas e bebidas)



MANĜILOJ (talheres)




PROFESIOJ (profissões)



VESTAĴOJ (roupas)



KORPOPARTOJ (partes do corpo)



LOĜEJO (moradia)



salono



VETERO KAJ NATURO (tempo e natureza)



TRANSPORTO (transporte)



aviadilo/aeroplano



SPORTOJ (esportes)




OBJEKTOJ, MAŜINOJ KAJ ALIAJ AFEROJ


(objetos, máquinas e outras coisas)



poŝtelefono



FAMILIO (família)



RESPONDOJ

BESTOJ KAJ PLANTOJ (animais e plantas)

knabino – knabo – viro – virino – homoj – bestoj – kato – hundo – ĉevalo – birdo – abelo – kolombo – rano – fiŝo – leono – simio – feino
arbo – floro – arbusto – rozo – ĝardeno

MANĜAĴOJ KAJ TRINKAĴOJ (comidas e bebidas)

manĝaĵo(j) – pano – salato – fazeolo(j) – rizo(j) – viando – persiko – vinberoj – pruno – pomo – sandviĉo – glaciaĵo – mielo – akvo – oranĝsuko/suko – vino – biero – lakto kaj kafo – sukero

MANĜILOJ (talheres)

bovlo – telero – forko – tranĉilo – kulero – glaso – kaliko – taso – kruĉo

PROFESIOJ (profissões)

instruisto (instruistino) – lernanto – reĝo – reĝino – princino – ĝardenisto – kelnero – akrobatoj – biciklisto – flegistino – kuracisto – ŝoforo – tajloro – oficiro – gardisto/policisto – soldato – vendisto – ĵurnalista (ĵurnalistino)

VESTAĴOJ (roupas)

ĉemizo – pulovero – robo – jako – koltuko – bluzo – pantalono – ĉapelo – ĉapo – surtuto – gantoj – ŝuo

KORPOPARTOJ (partes do corpo)

kapo – vizaĝo – okulo – nazo – buŝo – dento – orelo – kolo – mano – brako – kubuto – kruroj – piedoj – ŝultro – muskolo(j) – artikoj – haro – koro – stomako

LOĜEJO (moradia)

domo – fenestro – pordo – muro – tablo – fotelo – dormĉambro/dormoĉambro – banĉambro – kuirejo – salono – naĝejo – kameno – palaco – akvrezervo

VETERO KAJ NATURO (tempo e natureza)

suno – luno – stelo – ĉielo – nubo – pluvo – neĝo – Tero/mondo – maro/plaĝo – rivero – ŝtono – tero – printempo – somero – aŭtuno – vintro

TRANSPORTO (transporte)

motorciklo – biciklo – aŭtomobilo – buso/aŭtobuso – taksio – aviadilo/aeroplano – trajno – helikoptero – kosmoŝipo – parkhologo – flughaveno

SPORTOJ (esportes)

teniso – futbalo/piedpilkado – korbopilko (korbopilkado) – golfo – naĝado – rusketi – pilko

OBJEKTOJ, MAŜINOJ KAJ ALIAJ AFEROJ

(objetos, máquinas e outras coisas)

libro – kajero – krajono – plumo – skrapgumo/frotgumo – mapo – komputilo – skribmaŝino – kudromaŝino – telefono – poŝtelefono – horloĝo – sonorilo – ekrano (televido) – paperoj – letero – skatolo – sako – medikamento – kesto – pakajo – ŝtofo – mono – perlo – statuo – strato – urbo – vilaĝo – lernejo – fruktobudo – malliberejo

FAMILIO (família)

edzo – marido	avo – avô	nepo – neto	patro – pai	filo – filho
frato – irmão	kuzo – primo	onklo – tio	nevo – sobrinho	

ĜENERALA REVIZIO DE VORTARO

Revisão Geral de Vocabulário

LECIONO 1

1. Kiam oni renkontas iun matene, oni povas diri “B _____ m _____!” Ni povas diri “B _____ t _____” dum la tuta tago. Ni diras “_____” kiam ni renkontas iun vespere; kaj “_____” por adiaŭi iun nokte.
2. R _____ = dumviva, ordinare hereda, monarko, kies insigno estas krono. Li estas estro [chefo] de lando aŭ popolo. Ties edzinon oni nomiĝas _____; ties filo estas pr _____, kaj ties filinon estas _____.
3. Kiam ni estas kontenta pri la afero, kiun iu faris al ni, ni povas diri “Da _____.” Poste, la persono povas respondi: “Neda _____.”
4. Profesiulo kiu instruas estas _____.
5. Homo kiu lernas, speciale en lernejo, estas _____.
6. Kiam iu diras al vi ion, sed vi ne havas la ĝustan ideon pri ties signifo, vi povas diri: “Mi ne ko _____.”
7. Juna viro estas kn _____, Juna virino estas _____.
8. Mi deziras trinki teon. = Mi v _____ trinki teon.

LECIONO 2

1. Kiam iu homo posedas energion, kaj kapablas resisti malfacilajn aferojn, ŝi aŭ li estas fo _____.
2. Persono, kiu ne timas la danĝeron kaj sentas sin forta estas k _____.
3. Inteligenta kaj sperta homo estas s _____.
4. Tio, kiu superas la ordinarajn dimensiojn estas gr _____.
5. Konstruaĵo, kie oni loĝas estas do _____.
6. Granda, luksa domo de reĝo, riĉulo aŭ nobelo estas pa _____.
7. Ne tre dika vesto, kiu kovras la supran parton de la korpo = ĉem _____.
8. Mola ujo el papero, plastika materialo, ktp., kun malfermaĵo ĉe la supro, por enteni objektojn kaj porti ilin. = sa _____.
9. Desegno figuranta regionon per simboloj. Kiam ni vojaĝas ni povas ĝin uzi por ne esti perdita. = m _____.
10. Rapidmanĝaĵo farita el du pecoj da pano. Inter ili, oni ĝenerale metas legomojn aŭ viando. = sand _____.
11. Ilo uzata al transporto, farita el du radoj [cirklaĵoj = rodas], kiu funkcias per motoro. = mot _____.
12. Aparato, kiun oni uzas, ekzemple, por konektiĝi al la interreto. = kom _____.

LECIONO 3

1. Loko apud domo, kie oni kreskigas plantojn (por manĝo aŭ por ornamo) = ĝar _____.
Homo, kiu laboras en ĝi, estas ĝar _____.
2. Direkti sian vidon sur ion = riga _____.
3. Malgranda, ruĝa, verda aŭ violkolora frukto multe uzada por fari vinon. = vin _____.
4. Frukto flava, ruĝa aŭ violkolora, kun bona acideta aŭ dolĉa gusto. = pr _____.
5. Mi ŝ _____ persikojn. = Mi pensas, ke persikoj estas bongustaj, kaj mi preferas ilin manĝi.
6. Se iu persono diras al vi: "Mi parolas Esperanton." Nun vi povas respondi: "An _____ mi parolas Esperanton."
7. Karesa [carinhoso] diminutivo por la patro = _____.
8. Karesa diminutivo por la patrino = _____.
9. Se via stomako estas malplena kaj vi volas manĝi, vi estas m _____.
10. Servisto, kiu laboras en restoracio kaj alportas manĝaĵojn aŭ trinkaĵojn = kel _____.
11. Kiam vi petas ion, kaj vi volas esti afabla, vi povas diri: "Bon _____."
12. Manĝaĵo konsistanta el herboj aŭ legomoj kun salo, vinagro kaj oleo = sa _____.
13. Trinkaĵo farita el fruktoj = s _____.
14. Tre malvarma manĝaĵo farita el sukero, kremo kaj lakto = gla _____.
15. Fluaĵo [aŭ fluido], el kiu konsistas la riveroj kaj maroj kaj kiun ni bezonas trinki por esti vivaj = ak _____.
16. Montri subitan feliĉon per karakteriza sono, streĉo [tensão] de la buŝo kaj esprimo de la vizaĝo = ri _____.
17. Analizi kaj pensi per nombroj pri la kvanton de ion = kal _____.
18. Planto, kiu estas pli malgranda ol arboj, sed pli granda ol herboj = arb _____.
19. Kutime bela kaj kolora parto de planto kun la reproduktaj organoj = fl _____.
20. Koni [conhecer] certe kaj precize = sc _____.
21. Havi koran (kaj eventuale ankaŭ seksan) inklinon por iu = am _____.
22. Mi kaj mia amiko estas am _____ esperantistoj. (=du kune)
23. Kuri for de iu aŭ io por lin aŭ ĝin eviti = for _____.
24. Ni devas progresi. Iru ant _____!
25. Vorteto uzata por montri logikan sekvon aŭ la konkludon = d _____.
26. Kapti iun por lin malliberigi = are _____.
27. Domo destinita por enŝlosi [prender, trançar] arestitojn aŭ kondamnitojn = ma _____.
28. Militismo, organizita batalisto = sol _____.
29. Homo kies okupo, ofico estas gardi = gar _____.
30. Vorto per kiu oni aparte signas kaj distingigas iun aŭ ion. = no _____. Petro, Zamenhof kaj Marko estas ekzemploj de propraj no _____.
31. Kiomo de la tempo pasinta depost la naskiĝo aŭ estiĝo = a _____.
32. Laboro, okupo = pro _____.

33. Konduki malproksimen de io = for _____.
34. Signo, kiu montras kvanton = nu _____.
35. Kunigaĵo de kelkaj paperfolioj uzataj por skribi = kaj _____.
36. Skribilo farita el tubeto, kies ekstremon enhavas kolora fluido por skribi = pl _____.
37. Ligna bastoneto [pequeno bastão de madeira] kun grafito aŭ alia mineralo, kaj uzata por skribi aŭ desegni = kr _____.
38. Ilo el gumo aŭ simila materialo por korekti desegnaĵojn, faritan per grafita kraĵono = skrap _____.
39. Meti manĝaĵojn en sia buŝo kaj stomako por sin nutri = man _____.
40. En la momento mem, dum kiu ni parolas = n _____.

LECIONO 4

1. La fizika universo, precipe la astroj kaj la spaco ekster la tero, kontraste al la homa mondo = ko _____.
2. Veturilo [ilo por transportado] kapabla iri tra la kosmo. = kosm _____.
3. Iri for de iu loko = fo _____.
4. Li mal _____ lia skatolo kaj serĉis manĝaĵon. (= Meti en staton, kiu ebligas [possibilita] eniron kaj eliron.)
5. Aparato por mezuri la tempon kaj montri la horojn = h _____.
6. Agrabla por la palato aŭ la spirito = bong _____.
7. Nenio estas en la kesto, ĝi estas malp _____. (= kiu enhavas nenion.)
8. Se iu el viaj objektoj malaperis kaj vi volas havi ĝin denove, vi devas ser _____ ĝin.
9. Tio, kion oni manĝas estas man _____.
10. Komercisto, kiu vendas aferojn estas ven _____.
11. Manĝebla parto de planto, produkto de fekundiĝinta floro = fru _____.
12. Velocipedo kun du egalgrandaj radoj [rodas] = bic _____. (Velocipedo: veturilo kun unu, du aŭ tri radoj, kiun oni movas, premante [pressionando] pedalojn per la piedoj)
13. Lasi aŭton, buson aŭ similan veturilon en taŭga [conveniente] loko, dum oni ne uzas ĝin = par _____.
14. Aparato por produkti ion, kiu funkcias per elektro, vaporo, ktp. = ma _____.
15. Prepozicio montranta [kiu montras] punkton de la spaco aŭ de la tempo, aŭ mezuron [medida], kiun la ago [ação] atingas, sed ne transpasas = ĝ _____. Ni studas Esperanton de la unua _____ la tria horo.
16. Intence esplori, provi guston de io = gust _____.
17. Kiam io estas tre malbona, aŭ kiam vi tre timas ion, vi povas diri: "Ter _____!"
18. Senluksa [sem luxo] barako aŭ butiketo el lignaj tabuloj [tábuas de madeira] = bu _____.
19. Forkuri por sin savi de reala aŭ imagita danĝero = fu _____.
20. Iri for kaj havi ion aŭ iun kun si aŭ sur si = forp _____.
21. Teni [ter] kaj movi al alia loko; havi kun si aŭ sur si = po _____.

22. Persono, kiun vi ŝatas kaj estas kara por vi, sed ne estas via edzo aŭ edzino, nek estas iu el via familio = ami_____.
23. Mesaĝo sur papero por sendi [enviar] al iu = let_____.
24. Oficisto, kiu portas leterojn = let_____.
25. Viro aŭ knabo, kiu havas la samajn gepatrojn kiel vi estas via fr_____.
26. Se vi havas f_____ aŭ f_____inon, vi estas patro aŭ patrino.
27. Senti aŭ percepti per la okuloj = vi_____.

LECIONO 5

1. Tiu vorto estas uzata kiel paŭzo por pensi = n_____.
2. Demanda adverbo, signifanta "en kiu loko?" = k_____.
3. Adverba vorteto uzata antaŭ aŭ post montraj adjektivoj, pronomoj kaj adverboj por esprimi plian proksimecon en spaco aŭ en tempo = ĉ_____.
4. Interparoli kun fama persono por demandi lin pri lia vivo, agoj aŭ opinioj kaj publike raportoj, ekzemple en gazeto aŭ televido = interv_____.
5. Sportulo, kiu biciklas = bicik_____.
6. Prepozicio, kiu montras origino, fonto, materialo, konsisto = e_____. Ŝi estis unu _____ la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.
7. Difinita regiono konsiderata kiel formanta apartan tuton [totalidade particular] laŭ geografia vidpunkto [ponto de vista] = la_____. Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn _____jn.
8. Moviĝi de la loko, kie oni estis, ĝis alia loko = ve_____. Li _____ de Usono [Estados Unidos].
9. En la momento mem, dum kiu ni parolas: n_____.
10. Ne esti plu, ne agi [agir] plu, ne daŭri [continuar] plu, interrompiĝi = ĉe_____.
11. Moviĝi de iu loko al alia = i_____. Li _____adis tre ofte [frequentemente] en la teatron.
12. Adverbo signifanta malproksimecon = f_____. F_____de l' okuloj, f_____de la koro.
13. Ĉesi agi, iri, moviĝi, ktp = hal_____. La soldatoj _____post longa marŝado.
14. Direkti sian vidon [visão] sur = riga_____.
15. Provi aŭdi; uzi la orelojn; atenti ies paroladon [fala de alguém] = aŭsk_____.
16. Surfaco [superfície], ekzemple en televido aŭ komputilo, uzata por vidigi bildojn per speciala teĥniko [tecnologia] = ekr_____.
17. Tuŝi per la lipoj [tocar pelos lábios] por esprimi amon aŭ respekton. = ki_____.
18. Sin vidigi, ekmontriĝi, fariĝi videbla = ape_____. Lu nekonata [desconhecido] _____is ĉe la pordo.
19. Ĉe homoj kaj bestoj, aro de la materiaj partoj, kiuj konsistigas la organaron = kor_____.
20. Parto de la animala korpo, supra ĉe la dupieduloj kaj antaŭa [dianteiro] ĉe la kvarpeduloj, enhavanta la cerbon [contendo o cérebro] kaj la organojn de pluraj sentumoj [sentidos] (buŝo, okuloj, oreloj, nazo, ktp.) = ka_____.
21. Organo de la vidkapablo. = ok_____.
22. Organo de aŭdkapablo. = or_____.

23. Kava [côncava] parto en la kapo de homo aŭ besto, per kiu ili sin nutras. = bu_____.
24. Parto de la korpo kuniganta [que liga] la kapon kun la trunko. = ko_____.
25. Unu el la du partoj de la homa korpo inter la kolo kaj la supra de la brako aŭ inter la kolo kaj la antaŭa kruro de besto. = ŝu_____.
26. La supera [superior] membro ĉe la homo. = br_____.
27. Parto de la supra homa membro, kie la brako artikiĝas kun la antaŭbrako = kub_____.
28. Parto de korpo, per kiu oni povas ion preni [pegar]. = ma_____.
29. Tiu parto de la korpo, per kiu homo aŭ besto iras; malsupra membro. = kr_____.
30. Parto ĉe ekstremo de la homa aŭ besta kruro, servanta por stari kaj paŝi = pi_____.
31. Malfermaĵo [abertura] en muro, konstruaĵo, ĉambro, en flanko de veturilo [lado de veículo] aŭ maŝino por lasi en- kaj el-iron [permitir entrada e saída]. = po_____.
32. Kapti iun aŭ ion per sia mano aŭ per instrumento, por teni [ter], porti aŭ uzi ĝin. = pre_____.
33. Meti manĝaĵon en la buŝon kaj poste stomakon por sin nutri = man_____.
34. Meti unu piedon antaŭ la alian por sin transloki = pa_____.
35. Senti odorojn per la nazo = fla_____.
36. Senti per la okuloj, percepti la bildojn de objektoj = vi_____.
37. Senti, percepti per la oreloj = aŭ_____.
38. Duoble aŭ pluroble faldi [dobrar] ion, tiel, ke unu parto ekkuŝas [estende-se, deita-se] sur alia parto = flek_____.
39. Nomi unu post alia literojn de vorto = lite_____.
40. Unuo [unidade] de parolado aŭ skribado [fala ou escrita] havanta [contendo, que contém] difinitan signifon kaj difinitan gramatikan uzon en homa lingvo = vor_____.
41. Iom granda aro da domoj, aranĝitaj [arranjadas] laŭ pluraj stratoj, iam (historie) ĉirkaŭita de murego = ur_____.
42. Filamento kreskanta el la haŭto [pele] de mamuloj [mamíferos] kaj pli-malpli dense kovranta ilian korpon. = ha_____. Ĉe homoj multaj _____kreskas sur la kapo.

LECIONO 6

1. Prepozicio signifanta akompanon: k_____kiu vi festas, tia vi estas.
2. En grado aŭ kvanto supera je iu alia: ĉu vi deziras p____da pano?
3. En alta loko, en la plej alta loko: mi staris sup____sur la monto kaj rigardis malsupren.
4. longa, maldika, rekta objekto, ofte el metalo = stan_____.
5. kiu povas foriri, se li, ŝi aŭ ĝi volas foriri = libe____.
6. Kun relative alta temperaturo = va_____.
7. Se vi ne volas manĝi plu, vi estas s_____.
8. Mi volis ŝlosi [chavar] la pordon, s____mi perdis la ŝlosilon [chave].
9. Se vi sentas bezonon [necessidade] trinki, vi estas so_____.
10. Kiam vi prenas akvon, lakton, sukron, kafon, vinon, bieron [cerveja], ktp. en la buŝo kaj glutas [engole], vi tri_____.

11. Fluaĵo, el kiu konsistas la riveroj kaj maroj; ĥemia simbolo H₂O = ak__.
12. Eligi fluaĵon tra la haŭtaj poroj [poros da pele], ekz-e pro varmego = ŝv__.
13. Ŝprucigi [jorrar, esguichar] akvon sur iun = du__.
14. Enhavanta [contendo] neniom aŭ malmulte da akvo, fluaĵo, suko, ktp. = se__.
15. Purigi objekton, frotante [esfregando] ĝin per io, kio forigas polvon [pó] aŭ malsekecon = vi__.
16. Sin vesti per = surm_____.
17. Se vi estas sen forto post laboro kaj bezonas ripozon, vi estas la__.
18. Resti dum kelka tempo nelaborante, nenion farante, por refreŝigi siajn fortojn; ne labori; ne fari ion, por mallaciĝi = rip_____.
19. Esti en vertikala pozicio = sta__.
20. Kiam vi perdas vian ekvilibron, vi povas fa__.
21. Prepozicio esprimanta proksimecon: li staris tutan horon ap__ la fenestro.
22. Natura fluanta, iom forta, akvaro enverŝiganta [desaguando] en riveregon aŭ en maron: la suno rebrilas en la klara akvo de la ri_____.
23. Esti en bona aŭ malbona stato, rilate al la funkcioj de l' organismo: kiel vi fa_____?
24. Kvan___ forte pluvis, ni iris eksteren.
25. La stelo, ĉirkaŭ kiu moviĝas la tero: mi estas la plej feliĉa homo sub la su___; post vetero malbela lumas [brilha] su___ plej hela.
26. Astro, kiu estas satelito de la Tero kaj rondiras ĉirkaŭ ĝi = lu__.
27. Amaso [montão, acúmulo, grande quantidade] da densaj akvovaporoj pendanta en la supra atmosfero kaj kaŝanta la ĉielon = nu__.
28. Memlumanta astro, kiu, pro malproksimegeco, aperas kiel brila surĉiela punkto = st__.

LECIONO 7

1. Senti, percepti per la oreloj = a__.
2. Signi sian jesadon [afirmação] per movo de la kapo, ofte per klino [inclinação] de ĝi malsupren kaj supren = kapj_____.
3. Esprimi sian penson per vortoj, uzante la voĉorganojn [órgãos da voz] = par_____.
4. Fari por vidi, ĉu oni povas fari = pro__.
5. 1. havi la forton, lertecon [habilidade] aŭ kapablon necesan por fari ion; 2. havi la rajton [direito], la aŭtoritaton necesan por fari ion; 3. havi la permeson, la eblecon [possibilidade] fari ion = p__.
6. Tre rapide iri = ku__.
7. Doni multajn fortajn frapojn [pancadas] = ba__.
8. Estiĝi, fariĝi en iu loko aŭ momento: la malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio ok_____ al ŝi.
9. Fari el krudaj [crus] materialoj substancojn aŭ objektojn utilajn por la homo = prod_____.
10. Sin movi sur aŭ en ia fluaĵo = na__.

11. Longa (unupeca) [de uma peça] vesto kun aŭ sen manikoj [mangas], kovranta la korpon de la kolo ĝis la piedoj aŭ ĝis la genuoj = ro__.
12. Ĉarma, estigante [instigando] entuziasman admiron = ra__.
13. Agrabla, ĉarma = pla__.
14. Muziki per sia voĉo = ka__.
15. Enigi kaj eligi aeron tra nazo aŭ buŝo; enlasi aeron en la pulmojn kaj ellasi ĝin post kiam ĝi reoksigenigis la sangon = spi__.
16. Organo konsistanta el karnaj fibroj kaj servanta por movi la diversajn partojn de la korpo = mus_____.
17. Juntaĵo inter du skeletaj elementoj de homo kaj de vertebruloj = art_____.
18. Ekzercado de la korpo per movoj = gi_____.
19. Forigi ion de ies okuloj, metante ĝin en sekretan lokon, aŭ kovrante ĝin per io = ka__.
20. Skulptaĵo prezentanta homon aŭ beston en pli-malpli natura grandeco = st_____.
21. Kiam akvo falas el nuboj, pl_____.
22. Resti [ficar] ĝis iu alvenos [chegar] aŭ io okazos = ate_____.
23. Ĉio ajn kio estas en la mondo, konkreta aŭ abstrakta, nedefinite montrata = afe_____.
24. Esprimi sian penson per vortoj = di__.
25. Malĝoji (aŭ ĝoji) tiel, ke larmoj (akvo) fluas el la okuloj = pl_____.
26. Granda aŭtomobilo por publika transportado de pluraj personoj samtempe, ĉefe en urbo aŭ en ĝia ĉirkaŭaĵo = bu__.
27. Rapide formovi de si ion tra la aero en alian lokon = ĵe_____.
28. Globforma ludilo = pil__.

LECIONO 8

1. Estigi aŭdeblan aervibradon = so__.
2. Elektra aparato ebliganta interparoladon je distanco per starigo de komunika kanalo inter la partoprenantoj [participantes] de la interparolo = te_____.
3. Sono de parolo, kanto, krio, farata de aero elblovita el la pulmoj kaj vibrita de la laringo = vo__.
4. Manĝo normale okazanta mallonge post la nokta dormo = mat_____.
5. Manĝo normale okazanta ĉirkaŭ tagmezo: mi nur iom malfruiĝos [atrasar-me-ei] al la ta_____, sed tio ne estas grava [não é importante].
6. Manĝo normale okazanta fine de la tago: post la ves_____ niaj fratoj eliris kun la gastoj [hóspedes].
7. Restigi iun aŭ ion en akvo, fluaĵo, precipe por lavi aŭ kuraci = ba__.
8. Esti en stato de korpa kaj spirita senaktiveco, kiu ĉe la homoj ordinare okazas dum ĉiu nokto, kaj estas necesa por ripozigi la homojn kaj la bestojn = do__.
9. Amika, amata = k__.
10. Senprokraste [sem procrastinar] post tiu momento: Mi tu_ foriras.

11. Ĉiu el la apartaj ejoj de domo, disigitaj per muroj, kaj komunikiĝantaj per pordoj = ĉam_____.
12. Tre malbona (korpa) sento = dol_____.
13. Medicinisto kiu aktive kuracas homojn = kur_____.
14. Iu kuracata de medicinisto aŭ operaciata de ĥirurgiisto = paci_____.
15. Konsenti [consentir] ricevi ion, kion iu donas aŭ proponas: mi proponis al li cigaron, kiun li kun danko akc_____.
16. Veni en ion = env_____.
17. Substanco uzata por sanigi; drogo uzata kiel kuracilo: ŝi akceptis de liaj manoj kuleron da med_____.
18. Elstara osteto [ossinho], en la buŝo de homoj kaj bestoj, kiu servas por mordi kaj maĉi [mascar] la nutraĵon: la d_____ de leono estas akraj.
19. Malantaŭa parto de la homa korpo, de ŝultroj ĝis pelvo = dor__.
20. Dividi solidajn per akra ilo = tra__.
21. Manĝilo konsistanta el tenilo [cabo] kaj plateto provizita per pluraj pikiloj [espetos], servanta por piki [espetar] ion kaj levi ĝin al la buŝo = fo__.
22. Unu el la manĝiloj, konsistanta el tenilo kaj el kava parto, ovforma aŭ ronda, per kiu oni ĉerpas fluaĵojn aŭ duonsolidajn nutraĵojn = kul_____.
23. Trinkujo, precipe por malvarmaj trinkaĵoj, ordinare pli alta ol larĝa, ofte el vitro [vidro], sed ankaŭ el aliaj materialoj, foje [às vezes] kun tenilo = gl_____.
24. Glaso kun piedo: Kaj li prenis panon, kaj [...] donis al ili, dirante: tio estas mia korpo, kiu estas donita por vi; [...] sammaniere ankaŭ la kali_____ post la vespermanĝo, dirante: tiu kali_____ estas la nova interligo en mia sango [sangue], kiu estas elverŝata [derramado] por vi.
25. Trinkujo destinita por trinkado de varmaj trinkaĵoj, precipe kafo aŭ teo. Ĝi estas proksimume duonsfera, duoncilindra aŭ similforma, ordinare malalta kun larĝa malfermaĵo, anso (tenilo), kaj estas farita el porcelano, fajenco [faiança – louça de barro] aŭ alia materialo: ta__.
26. Iom kava, plata [plano, chato], malprofunda vazo, el kiu oni manĝas = tel_____.
27. Vazo farita el argilo, fajenco, porcelano, metalo aŭ alia materialo, kun aŭ sen anso, kaj ne havanta kolon = bov__.
28. Ornamento kapvesto de reganto = kro__.
29. Malinterne: mi staras ek_____ la domo kaj li estas interne.
30. Pasante apude = pre__.
31. Ĝis la nuna momento: la sukceso ank_____ ne estas certa.
32. Plene, komplete, senescepte [sem exceção]: mi estas tu__ trankvila.
33. Havanta korpon, organaron, menson [mente], kiuj bone kaj normale funkcias: Se mi estus sa__, mi estus feliĉa.
34. Loko taŭga [apropriado] por naĝo: naĝ_____.
35. Kiu plaĉas kaj plezurigas: la vizaĝo de tiu infano estas agr_____; lia vizito estis al mi tre agr_____.

36. Sportludo, en kiu du aŭ kvar ludantoj per specialaj batiloj (rakedoj) alterne sendas pilketon trans mezan reton [rede] al la kontraŭa parto de la ludejo = ten_____.
37. Sin amuzi, sin distri [distrair], agante [agindo, fazendo], ne por ia utilo, sed por nura plezuro de agado [ação] = lu__.
38. Depost nun; ekde nun; senplie; senalie; sen plua atendo: mi j__ havas mian ĉapelon, nun serĉu vi vian; j__ estas tempo iri domon.
39. Sidi sur iranta besto (ĉevalo, azeno, kamelo,...); sidi sur biciklo kaj veturi: kiu kuraĝas ra_____ sur leono?
40. Besto kvarpieda, kiun homo kutime uzas por rajdi = ĉev_____.
41. La hela parto de diurno [dia (as 24 horas)], la tempospaco dum kiu la suno, de sia leviĝo ĝis sia subiro, prilumas koncernan parton de la tero: mi veturis du ta_____ kaj unu nokton.
42. Tiu parto de la diurno, dum kiu la suno estas sub horizonto kaj ne lumas al ni: en la no_____ ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn.
43. La nuna tago; ĉi tiu tago = hod_____.
44. Alkohola trinkaĵo, ekstraktita el fermentintaj vinberoj: la v__ gajigas la koron de la homo.
45. Korpe aŭ spirite peni por produkti aĵon, plenumi taskon [cumprir tarefa], rezultigi efikon [feito] = lab_____.
46. Bestoj kovritaj de plumoj, kun du piedoj, flugiloj [asas], naskantaj ovojn, el klaso de vertebruloj = bi_____.
47. Sin movi en aero, kiel birdo aŭ insekto; sin movi en aero per aparato = fl_____.
48. Dombesto apartenanta al tiu genro, devenanta de lupo [lobo], kun multaj rasoj, uzata precipe por gardado kaj ĉasado: hu_____ estas plej bona amiko de homo.
49. Malhavi ion necesan: mi bez_____ monon, ripozon...

LECIONO 9

1. Plenumi [desempenhar, cumprir] la propran difinitan taskon, parolante pri organo, maŝino kaj ĝenerale ĉiu ajn ilo aŭ organizo: la maŝino ne plu bone fun_____.
2. Stato de la atmosfero = vet_____.
3. Donanta aŭ ricevanta vivan lumon, tre luma, lumplena: la varma kaj he___ radio de l' suno.
4. Profesiulo, kiu kolektas novaĵojn aŭ aliajn informojn, kaj prezentas ilin en gazeto aŭ alia amasinformilo = ĵu_____.
5. Viro ligita al virino aŭ alia viro per ceremonio (geeziĝo) aŭ kontrakto por vivi kune = e_____.
6. Forte inklini al ia ago, pro ofta [freqüente] ripetado: li kut_____ fumi pipon [cachimbo] post tagmanĝo.
7. Samnivela parto de domo: ni levadis nin ĉiam pli kaj pli alte ĝis la kvara eta_____.
8. Ne je la flanko [lado] de la koro: La plimulto de la homoj skribas per sia dek_____ mano.

9. Demanda senfleksia pronomo, signifanta „de kiu, de kiuj?“ kaj montranta la apartenecon: k___ ĵurnalo tio ĉi estas? – Ĝi estas mia.
10. Estanta en alta loko aŭ en la plej alta loko: Ŝi staras sur la su___ parto de ŝtuparo.
11. Sin vidigi, ekmontriĝi [mostrar-se], fariĝi videbla: iu nekonata [desconhecido] ap___ is ĉe la pordo; la unuaj floroj ap___ as en la ĝardeno.
12. Ne esti plu, ne agi plu, ne daŭri plu, interrompiĝi: la bruo [barulho] ĉ___ por unu momento.
13. Ne tute, ne plene; iomete malpli ol: 59 minutoj estas pre___ unu horo.
14. Forte, intense aŭdebla: la ___ voĉo.
15. Rigardi ĉirkaŭ si, al diversaj direktoj: Li ĉir___ kaj vidante, ke li estis sola, malfermis la pordon mallaŭte.
16. Trovi [encontrar] iun irante kontraŭdirekte al li: hieraŭ mi renk___ vian filon.
17. Diferenca, malsama: li estas tute al___ ol li estis; la rezultato estis tute al___ ol ni esperis.

LECIONO 10

1. Prepari nutraĵon, elmetante ĝin al varmego por igi ĝin manĝebla: ku___.
2. Malfaciligi aŭ malhelpi ies movojn; maloportuni al iu, malkomfortigi iun: tiu senĉesa bruo ĝe___ min.
3. Loko en ĉambro, kie povas esti fajro [fogo] sen danĝero = ka___.
4. Konstruo pli alta ol dika, kiu konsistigas la flankojn de domo, ĉirkaŭas spacon aŭ dividas ejon = mu___.
5. Du interligitaj homoj; duo de samspecaj aferoj: p___ da ŝuoj, da gantoj...
6. Komforta seĝo [cadeira] kun dors- kaj brakapogilo [apoio para as costas e braços], brakseĝo = fot___.
7. Mamulo simila al homo = si___.
8. Tio, kion oni volas, ke okazu; tio, al kio oni volas veni; tio, kion oni volas atingi: la libro tute taŭgas por sia ce___.
9. Ne foriri, ne malaperi, estadi en koncerna loko: res___ kun leono estas danĝere.
10. Ebleco [possibilidade] de malbono, de malfeliĉo: tiam la estonteco [futuro] de nia afero estos absolute ekster dan___.
11. (pri organizitaj estaĵoj [seres]) lomo post iom disvolviĝi, pligrandiĝi ĝis normala mezuro: kre___ plantoj, haroj, bestoj...
12. Lasta parto de io, en tempo aŭ spaco: de la komenco ĝis la f___.
13. Tre malbona, kiu kaŭzas timon [medo] = ter___.
14. Konforma al la realo, malfalsa: ve___ rakonto.
15. Granda, longedaŭra katastrofo: la maŝino povas esti liberigilo aŭ pla___ por la homaro [humanidade].
16. Atingi: la morto tr___ lin subite; malfeliĉo tr___ lin; multe da suferoj kaj mizero tr___ tiam la hebreojn; stranga okazo min tr___.

17. Laŭtigi la voĉon por komprenigi al iu, ke li devas veni: ne vo___ diablon, ĉar li povas aperi.
18. Senti malagraban senton, kaŭzatan de efektiva aŭ imaga minacanta [ameaçador] danĝero aŭ malbono, kiun oni deziras eviti: Ni ĉiuj ti___ la doloron kaj la morton.
19. Porti kun si, sur si unu aŭ plurajn objektojn: bonvolu kun___ kun mi la tablon supren.
20. Veni ĝis dezirata loko; veni ĝis dezirata rezulto; sukcesi tuŝi ion, kiu estas malproksima: etendante [esticando] la brakon, li ati___ la pomon.
21. Ĉesi agi, iri, moviĝi ktp: la soldatoj hal___ post longa marŝado; jam de hieraŭ mia horloĝo hal___.
22. Kiam ni parolas kun reĝo aŭ reĝino, ni vokas ilin: “Via maj___.”
23. Esperantigita nomo de “Internet” = ___.
24. Meblo [móvel] konsistanta el plato subportata de unu aŭ pluraj kruoj (aŭ piedoj): la libro estas sur la ta___.

LECIONO 11

1. En grado aŭ kvanto supera je iu alia: ĉu vi deziras ___ da pano?; la papero estas tre blanka sed la neĝo estas ___ blanka; lakto estas ___ nutra, ol vino; li amas lin ___, ol sin mem; ne estas permesite al mi ___ diri; diru nenion ___ pri tio ĉi.
2. Adv. esprimanta kvanton aŭ gradon superan al ĉiuj aliaj: ŝi estis unu el la ___ belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.
3. Ne alia homo, sed tiu homo: mi aŭdis tion de li m___ = mi aŭdis tion de li, ne de iu alia; mi m___ faris tion = mi ne petis, ke iu alia faru tion, sed mi faris
4. Flugmaŝino, kies helico samtempe levas la maŝinon kaj antaŭenmovas ĝin = he___.
5. Montri, kiu estas iu aŭ kio estas io; vidigi aŭ aŭdigi (teatraĵon, spektaklon,...) = prez___.
6. Plene preparita; disponebla por tuja uzo: la tagmanĝo estas pr___; ŝi havas pr___ respondon por ĉiu demando.
7. Prepozicio montranta objekton, malinterne de kiu staras alia objekto: mi staras ek___ la domo kaj li estas interne; (figure) la estonteco de nia afero estas absolute ek___ danĝero.
8. Ekpreni, tiel, ke la kaptajo aŭ kaptito ne plu povas foriri: pasero [pardal] ___ tita estas pli bona, ol aglo [águia] ___ tota.
9. Rekonsciigi el dormo: ĉiumatene mi ve___ kun ĉagreno [desgosto].
10. Fariĝi nevidebla, ne plu esti videbla: ili malap___ kiel vaporo.
11. Eventuale, povas esti ke, povas esti aŭ ne esti, okazi aŭ ne okazi: eb___ mi povos vin helpi.
12. Neakompanata, ne estanta kun aliaj, izola: kelkfoje mi ŝatas promeni so___.
13. Maŝino, kiu rapide kudras = ku___.
14. Meti en pakon [pacote, embrulho] = en___.
15. Fermentinta trinkaĵo el malto, lupolo, akvo kaj foje kun aliaj aldonaĵoj = bi___.

VORTARO

Estude algumas das palavras que foram apresentadas nessa revisão:

estro: chefe	rado: roda	karesa: carinhoso	fluaĵo: fluido, líquido
streĉo: tensão	koni: conhecer	enŝlosi: trancar, prender	bastoneto: pequeno bastão
veturilo: veículo	ebligi: possibilitar	premi: pressionar, apertar	taŭga: conveniente
montri: mostrar	mezuro: medida	ago: ação	agi: agir
lusko: luxo	ligno: madeira	tabulo: tábua	teni: ter
sendi: enviar	tuto: totalidade	aparta: à parte, separado, particular	vidpunkto: ponto de vista
Usono: Estados Unidos	daŭri: continuar	ofte: freqüentemente	vido: visão
surfaco: superfície	teĥniko: tecnologia	tuŝi: tocar	nekonata: desconhecido
antaŭa: dianteiro	enhavi: conter	cerbo: cérebro	sentumo: sentido
kava: côncavo	kunigi: ligar	supera: superior	preni: pegar
malfermaĵo: abertura	lasi: permitir	eniro: entrada	eliro: saída
faldi: dobrar	kuŝi: deitar	unuo: unidade	parolado: fala
skribado: escrita	haŭto: pele	mamulo: mamífero	ŝlosi: chavear
ŝlosilo: chave	bezono: necessidade	gluti: engolir	ŝpruciĝi: jorrar, esguichar
froti: esfregar	polvo: pó	enverŝiĝi: desaguar	verŝi: despejar, derramar
lumi: brilhar	amaso: multidão, pilha	jesado: afirmação	klino: inclinação
voĉorganoj: órgãos da voz	lerteco: habilidade	ebleco: possibilidade	frapo: pancada
kruda: cru	maniko: manga (de roupa)	mango: manga (fruta)	estigi: instigar, causar
resti: ficar	alveni: chegar	partopreni: participar	gasto: hóspede
prokrasti: procrastinar	osto: osso	maĉi: mascar	tenilo: cabo
pikilo: espeto	piki: espetar	foje: às vezes	sango: sangue
elverŝi: derramar	fajenco: faiança (louça de barro)	plata: plano, chato	escepto: exceção
menso: mente	reto: rede	distri: distrair	diurno: dia (de 24 horas)
efiko: efeito	lupo: lobo	plenumi: cumprir, desempenhar	pipo: cachimbo
flanko: lado	trovi: encontrar	fajro: fogo	seĝo: cadeira
brakapogilo: apoio para os braços	apogi: apoiar	estaĵo: ser	timo: medo
homaro: humanidade	pasero: pardal	aglo: água	ĉagreno: desgosto
pako: pacote, embrulho			

RESPONDOJ DE LA REVIZIO

LECIONO 1

1. Bonan matenon – Bonan tagon – Bonan vesperon – Bonan nokton.
2. Reĝo – reĝino – princo – princino (ou: reĝido – reĝidino)
3. Dankon – Nedankinde
4. instruisto
5. lernanto
6. komprenas
7. knabo – knabino
8. volas

LECIONO 2

- | | | | | |
|----------------|---------------|---------|-----------|--------------|
| 1. forta | 2. kuraĝa | 3. saĝa | 4. granda | 5. domo |
| 6. palaco | 7. ĉemizo | 8. sako | 9. mapo | 10. sandviĉo |
| 11. motorciklo | 12. komputilo | | | |

LECIONO 3

- | | | | |
|-------------------------|-------------|-----------------|---------------|
| 1. ĝardeno – ĝardenisto | 2. rigardi | 3. vinbero | 4. pruno |
| 5. ŝatas | 6. Ankaŭ | 7. paĉjo | 8. panjo |
| 10. kelnero | 11. Bonvolu | 12. salato | 13. suko |
| 15. akvo | 16. ridi | 17. kalkuli | 18. arbusto |
| 20. scii | 21. ami | 22. ambaŭ | 23. forkuri |
| 25. do | 26. aresti | 27. malliberejo | 28. soldato |
| 30. nomo – nomoj | 31. aĝo | 32. profesio | 33. forporti |
| 35. kajero | 36. plumo | 37. kraĵono | 38. skrapgumo |
| 40. nun | | 39. manĝi | |

LECIONO 4

- | | | | | |
|---------------------|--------------|------------|-------------------|---------------|
| 1. kosmo | 2. kosmoŝipo | 3. foriri | 4. malfermis | 5. horloĝo |
| 6. bongusta | 7. malplena | 8. serĉi | 9. manĝaĵo | 10. vendisto |
| 11. frukto | 12. biciklo | 13. parki | 14. maŝino | 15. ĝis – ĝis |
| 16. gustumi | 17. Terure | 18. budo | 19. fuĝi | 20. forporti |
| 21. porti | 22. amiko | 23. letero | 24. leterportisto | 25. frato |
| 26. filon – filinon | 27. vidi | | | |

LECIONO 5

- | | | | | |
|------------------|---------------------|--------------------|--------------|---------------|
| 1. nu | 2. kie | 3. ĉi | 4. intervjui | 5. biciklisto |
| 6. el – el | 7. lando – landojn | 8. veni – venas | 9. nun | 10. ĉesi |
| 11. iri – iradis | 12. for – For – for | 13. halti – haltis | 14. rigardi | 15. aŭskulti |
| 16. ekrano | 17. kisi | 18. aperi – aperis | 19. korpo | 20. kapo |
| 21. okulo | 22. orelo | 23. buŝo | 24. kolo | 25. ŝultro |
| 26. brako | 27. kubuto | 28. mano | 29. kruro | 30. piedo |
| 31. pordo | 32. preni | 33. manĝi | 34. paŝi | 35. flari |
| 36. vidi | 37. aŭdi | 38. fleksi | 39. literumi | 40. vorto |
| 41. urbo | 42. haro – haroj | | | |

LECIONO 6

- | | | | | |
|----------|-----------|----------|-----------|-------------|
| 1. kun | 2. pli | 3. super | 4. stango | 5. libera |
